

V-19034 / 1958

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道



1958

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO



Rezulte de la rektifa
kampanjo leviĝis inter la kadroj
ALTA TAJDO DE MALSUPRENIRO
por ideologia remuldo kaj akcelo
al la socialisma konstruado

1. Svarmiĝas sin-registrantoj en la koridoro de la Ministro de Eksterlanda Komerco
2. Ĉio pretiĝis por iro al kamparo
3. Nova kampano helpas la malnovajn informi pri kurantaj aferoj de la mondo
4. Gu Shan-gen, kadro de Jiangsu-provinco, ekloĝiĝis en kamparo kune kun sia familio kaj ili baldaŭ kutimiĝis al la nova vivo
5. Jen estas granda lernejo por la novaj kampanoj, kie ili povas multon lerni de la veteranaj terkulturistoj



Apelo al la Tutmondaj Popoloj

— Deklaracio de la Solidara Konferenco de la Aziaj kaj Afrikaj Popoloj —

Ni, popoloj Aziaj kaj Afrikaj, kunvenas en Kajro de la 26a de decembro, 1957 ĝis la 1-a de januaro, 1958, por diskuti la internaciajn problemojn precipe koncernantajn al la popoloj Aziaj kaj Afrikaj.

Ni pristudis la problemojn politikajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn starantajn antaŭ la popoloj Aziaj kaj Afrikaj.

La unika sento, kiu instigas nin, estas la sento de kunlaboro kaj solidareco inter niaj popoloj kaj solida amikeco kun la tutmondaj popoloj.

Post la harmonia diskutado sep-taga nia konferenco jam atingis unuanimajn konsentojn pri la proponoj por solvi diversajn problemojn. Tio pruvas, ke la popoloj Aziaj kaj Afrikaj jam atingis pli solidan

unuigon en pacdefendo kaj jam venis al la etapo de agado laŭ komuna programo. La konferenco unuanime konsentis starigi konstantan organizon en Kajro por faciligi la realigon de la konferenca rezolucio.

Ni deklaras, ke la principoj aprobitaj de la Bandunga konferenco en aprilo, 1955 ankoraŭ devas esti bazo de internaciaj rilatoj. Ni refoje deklaras, ke ni plene subtenas la sekvantajn dek principojn subtenatajn de niaj popoloj en la pasintaj jaroj:

1. Respekti la bazajn hom-raĵtojn, respekti la celojn kaj principojn de la Ĉarto de UNO.

2. Respekti la suverenecon kaj teritorian integrecon de ĉiuj landoj.

3. Agnoski la egalecon de ĉiuj rasoj kaj ĉiuj landoj grandaj kaj malgrandaj.

4. Ne entrudiĝi aŭ interveni en la internajn aferojn de aliaj landoj.

5. Respekti la rajton de ĉiu lando memdefendi unuope aŭ kolektive laŭ la Ĉarto de UNO.

6. a) Ne servi al aparta intereso de iu ajn potenca lando per aranĝo de kolektiva defendo.

b) Iu ajn lando ne fari premon sur aliajn landojn.

7. Ne atenci la teritorian integrecon kaj politikan sendependecon de iu ajn lando per agresa ago, agresa minaco aŭ perforto.

8. Solvi ĉiujn internaciajn disputojn laŭ la Ĉarto de UNO, per interparolado, interpacigo, arbitrado, juĝado aŭ ĉiu ajn alia paca metodo elektita de la koncernaj flankoj.

9. Akceli niajn reciprokajn interesojn kaj kunlaboradon.

10. Respekti justecon kaj internaciajn devojn.

Ni plene kredas, se ĉi tiuj 10 principoj estos akceptitaj, la nuntempa streĉa internacia situacio certe malstreĉiĝos kaj mal-

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo — **Pentraĵo de Ren Bo-nian (1840-1895)**

Apelo al la Tutmondaj Popoloj

Prezidanto Mao Legas Opiniaĵojn

Estu Klera Juna Kooperativano

Vivo Laborema

Neforgesebla Hindio

La Kajto

Plano por Hanlingva Fonetika

Alfabeto

Nova Etapo de Ĉina Esp-movado

Bildo sur la dorsa kovrilo — **Kune**

Labori kaj Ĝui la Laborfruktojn

(de Cai Zheng-hua)

Rektifa Kampanjo

Elĉerpajo de la parolado de Prezidanto Mao Ze-dong ĉe la Konferenco de la Supera Soveto de USSR celebranta la kvardekan datrevenon de la Oktobra Socialisma Revolucio

La ĉina popolo, sub la gvidado de la Komunista Partio, estas efektiviganta viglan rektifan kampanjon por rapide disvolvi socialismon en Ĉinio sur pli firma fundamento. Tio estas kampanjo solvi korekte la kontraŭdirojn fakte ekzistantajn interne de la popolo kaj tuj solvendajn per tutlanda debato, gvidata kaj libera, en la urboj kaj kamparo pri tiaj temoj kiaj la socialisma vojo kaj la kapitalisma vojo, la fundamentaj sistemoj kaj gravaj politikoj de la ŝtato, la laborstilo de la funkciuloj de la Komunista Partio kaj la registaro — debato farata per elmeto de la faktoj kaj per argumentado. Tio estas socialisma kampanjo de memeduko kaj memreformado de la popolo, kaj grandaj sukcesoj jam estas atingitaj en ĝi. Kie ajn la kampanjo efektiviĝis, la socialisma konscio de la popolo estas rapide plialtigita; la malveraj ideoj, rapide klarigitaj; la difektoj en la laboro, rapide venkitaj; la unueco interne de la popolo, rapide plifortigita; kaj la labordisciplino kaj la produktiveco, rapide plialtigitaj. Ni estas antaŭenpuŝanta, etapon post etapo kaj sekcion post sekcio,

tiun kampanjon de memedukado de la popolo inter niaj sescent milionoj da poloj, kaj kredeble, post aliaj kelkaj monatoj, landskala sukceso estos atingita. Ni intencas organizi rektifan kampanjon ĉiujare aŭ ĉiudujare en la venonteco — ĝia daŭro povos esti multe mallongigita — kiel unu el la ĉefaj metodoj por solvi diversajn sociajn kontraŭdirojn en nia lando en la daŭro de la tuta transira periodo. La fundamenta ekirpunkto por praktiki tiun metodon estas la firma kredo, ke la plimulto de la popolamaso staros en nia flanko, kaj ke ili aŭskultos la racion. Tion jam pruvis la tuta sperto de la kampanjo.

Dum multjara revolucia praktikado, ni disvolvis la metodon de rektifa kampanjo laŭ la leninismaj principoj resti en intima kontakto kun la popolamaso, rekoni ilian iniciatemon kaj praktiki kritikon kaj memkritikon. La korekteco de tiu ĉi metodo estas ankoraŭ-foje pruvita de la nuna socialisma movado de memeduko.

Esperantigis Sumio

(Daŭrigo de P. 3)

aperos la teruro de pereco, kiu hodiaŭ plenigas la korojn de milionoj da homoj.

Ni deklaras, ke solida bazo de paco ne povos esti konstruita, escepte se neniigis ĉi tiu streĉa situacio. Ni bonvenigas ĉiun paŝon en tiu direkto. Ni alvokas la tutmondajn popolojn utiligi ĉiujn eblajn rimedojn por krei medion de interkonsento kaj interkompreniĝo, kio nepre kondukos al malarmado, malpermeso al la produkto, provo kaj uzo de nukleaj armiloj. Ni alvokas la tutmondajn popolojn uzi siajn penojn en la sfero de scienco kaj la nuklean energion al la celo de paco kaj al servo al

homaro, kaj realigi la prosperon kaj plenan kunlaboron inter la popoloj sur la bazo de egaleco laŭ la Ĉarto de UNO.

La popoloj Aziaj kaj Afrikaj kredas la Ĉarton de UNO.

La popoloj Aziaj kaj Afrikaj opinias, ke la imperialisma regado, la eksterlanda ekspluatado kaj ĉiuj aliaj krimoj rezultiĝintaj el konkerado al popoloj, ne nur estigas malutilojn al la registaroj kaj la regatoj en disvolvo de paco kaj internacia kunlaboro, sed ankaŭ signifas neigon de la baza homrajto kaj ofendon kontraŭ la Ĉarto de UNO. La daŭra ekzisto de la imperialismo ne akordas kun la nova epoko en kiu la mondo

Prezidanto Mao Legas Opiniafiŝojn



Prezidanto Mao legas opiniafiŝojn

(Foto de Ding Jun)

nun troviĝas. La popoloj Aziaj kaj Afrikaj firme kredas la rajton de ĉiuj nacioj batali por libero kaj sendependeco.

La popoloj Aziaj kaj Afrikaj deziras unuiĝi, kune klopodi kaj interhelpi por batali por sia feliĉo kaj tiu de tuta homaro. Ni kontribuos ĉiujn niajn fortojn al la batalo por la realigo de eterna mondopaco.

La paco nepre venkos.

La homaro povas rigardi en la estontecon kun plenaj espero kaj memfido. Jen estas la novjara bondeziro de la Solidara Konferenco de la Popoloj Aziaj kaj Afrikaj en Kajro al la tuta mondo.

Tradukita de AŬRORO

PLENE FLORANTA ĜARDENO

EN la antaŭtagmezo de a 18-a de sept. en la pordegon de la Unua Ŝtata Kotonteksejo de Ŝanhajo enveturis kelkaj aŭtomobiloj, kiuj haltis sur la malgranda placo antaŭ la administra domo de la fabriko. Elaŭtiĝis kune kun aro da aliaj gastoj, fortika Prezidanto Mao en griza uniformo. Ili speciale venis ĉi tien por legi opiniafiŝojn.

Elaŭtiĝinte Prezidanto Mao tuj vidis kontraŭvizaĝe opini-afiŝojn surgluitajn plenplene ambaŭflanke de la koridoro. Ili nombris almenaŭ du aŭ tri mil foliegojn. Ambaŭ flankoj de la kelkdek metrojn longa pasejo kondukanta de la pordego ĝis la Suda Ŝpinejo estis densdense kovritaj de surgluitaj opini-afiŝoj. Pro manko de sufiĉa spaco eĉ multaj tabuloj estis starigitaj apude por provizore ilin surglui. Laŭ tia arda aspekto oni povas unuavide diveni ke la rektifa kampanjo en tiu ĉi fabriko estas flame disvolviĝanta. Ĉirkaŭrigardinte la situacion, Prezidanto Mao ridetis plezure kaj akompanate de la sekretario de la fabriko partikomitato kaj la fabrikestro, alpaŝis antaŭ la opini-afiŝojn kaj komencis legi ilin unu post alia.

Etendiĝas antaŭ Prezidanto Mao maro da opini-afiŝoj, kiu ja similas al vivplena, pompe floranta ĝardeno. Jen estas kritikoj kontraŭ la laboroj de la partio kaj la pensoj kaj agmanieroj de kelkaj partian-kadroj. Jen estas trafaj traktatoj pri la politika vivo de la lando. Jen estas proponoj por diversaj laboroj kaj akraj polemikoj pri eraraj opinioj. Ili estas vivecaj, multspecaj kaj riĉe ilustritaj. Estas humoraĵoj, akraj satiraj poemoj, *kuaiban*¹ kaj *shunkouliu*², eseoj, raportoj de enketoj pri specialaj problemoj, interesaj drametoj kaj dialogoj. . . . Tiuj kelkmil folioj da valoraj opini-afiŝoj, kolektive verkitaj de la kelkmil laboristoj de la Unua Ŝtata Kotonteksejo de Ŝanhajo, plene elmontris ne nur la talenton de la laboristoj, sed ankaŭ ilian altgradan politikan aktivecon.

LA UNUA PAFO DE LA GRANDA DEBATO

La unua folio, kiun Prezidanto Mao legis, estis skribita de aro da veteranaj laboristoj. Ĝi

aperigis iliajn parolojn en iu kunsido. La veteranaj laboristoj prezentis multajn kritikojn al la partio kaj la administrantaro de la fabriko.

La plej varme polemikata temo en la opini-afiŝoj de la laboristoj estis tiu de vivtenado. Iu juna laboristo nomata Tang plendis per opini-afiŝo pri la malalteco de sia salajro, dirante ke li vivas je galo kaj absinto. La veteranaj laboristoj argumentis kun li per opini-afiŝoj, rimarkante ke lia salajro pliiĝis ĉiujare de post kiam li venis en la fabrikon en 1951. Lia komenca salajro en tiu jaro jam estis 40 jŭanoj monate, kaj lastjare ĝi eĉ pliiĝis ĝis 56.50 jŭanoj. En lia familio estas entute tri personoj, do ĉiu ricevas meznombre proksimume 20 jŭanojn por vivkosto. Sur unu el la opini-afiŝoj skribiĝis: "Tang Xue-gen, ĉu vi ankoraŭ memoras kian veston vi portis kiam vi venis? Kaj nun, sidas sur vi lana pantalone, bone gladita ĉemizo, kaj brile poluritaj ŝuoj. Kiam vi pro malsaniĝo kuŝis en hospitalo, la ŝtato pagis la kurackoston por vi. Kiam vi troviĝis en financa malfacileco, la sindikato donis al vi subvencion. Vi ja ne konas feliĉon vivante en feliĉo."

TIU ĈI PENTRAĴO ESTAS TRE BONA

Iu interesa karikaturo altiris la atenton de Prezidanto Mao. Ĝi prezentis homon, kiu sin vestas per senfine longa pantalone. Ĉar iu diris, ke lia salajro estas tiel malalta ke ĝi nur sufiĉas por aĉeti unu pantalonotubon. Sed fakte lia salajro estis 56 jŭanoj per kiu li povis aĉeti kelkajn rul-ajojn da ŝtofo. Pro tio la aŭtoro de la karikaturo humore demandis: "Kiel longa ja estas via pantalonotubo?" Prezidanto Mao ridetante diris al Xia Zheng-yan, sekretario de la partikomitato: "Tiu ĉi karikaturo estas tre bone pentrita kaj tre pensiga."



Kiel longa
ja estas
via
pantalo-
tubo



KIEL SINTENAS LA KRITIKITAJ KADROJ?

Multe da opini-afiŝoj kritikis la pensojn kaj agmanierojn de la gvidantaj kadroj. Oni kritikis, ke kelkaj kadroj ne enpenetras en la laboron, "Nur la ŝtuparo sonas, sed neniu malsupren venas"; kelkaj kadroj "ĝuas antaŭ la aliaj, penas post la aliaj"; kelkaj kadroj traktis la laboristojn maldece kiel "Sinjora Moŝto". . . . Kvankam kelkaj el la opini-afiŝoj uzis tre akrajn vortojn, tamen ili estis plejparte pravaj kaj bonintencaj. Montrante opini-afiŝon kritikantan la fabrikestron kaj la partisekretarion, Prezidanto Mao diris: "Tiu ĉi estas bone skribita." Post momento li prizorgeme demandis la sekretarion kaj la fabrikestron: "Ĉu la kritikitaj kadroj jam levis sian kapon?" Kamaradoj Xia Zheng-yan kaj Huang Zong-lin respondis: "La plej granda parto de la partian-kadroj en la fabriko sintenas korekte, humile aŭskultas la opiniojn de la amaso kaj estas farantaj la laboron de rektifado kaj plibonigado samtempe."

La demandon de Prezidanto Mao fakte jam respondis la opini-afiŝoj. Inter ili estis aparta rubriko kiu de tempo al tempo sciigis ĝustatempe

Zhu Jun:

SUR LA

SUR la montdeklivoj kaj la ebenaĵo, ĉie estas homamasoj helpantaj al la terkulturistoj kontraŭbatali trosekecon kaj semadi tritikon. Inter ili estas buroestroj, subburoestroj, fakestroj, inĝenieroj, teknikistoj. . . . viraj kaj inaj, maljunaj kaj junaj, estis tiaj, kiuj eĉ ne konis la grenojn, kaj tiaj, kiuj iam manipulis plugilon. Ĉiuj decidis finsemi tritikon por la terkulturistoj antaŭ la "tago de prujnapero" t.e. la 23a de oktobro.

La grupestro de produkto asignis al ni la laboron frakasi terbulojn. Antaŭ ĉio, nia grupestro klarigis al ni la signifon de la laboro. Li diris: "Kial oni devas frakasi terbulojn? Ĉar nur post tio oni povas fari sulkojn, kaj post tio semi tritikon, kaj post tio akvumi la tritikon por ke ĝi ekĝermu, alie—" li daŭrigis kun mansvingo, "kiel blindulo bruligas kandelon, tio estas vanfaro sen celo — la tritiko ne burĝonos sen frakaso de terbuloj." Aŭdinte tion, ni rigardis unu la alian kaj ekridis kompreneme.

La grupestro asignis al ni tekniko-konsilanton. Fingromontrante iom ĝiban blankbarbulon starantan ĉe la kampfino, li diris: "Kion vi devas fari, de-

al la laboristoj la novaĵojn de la plibonigado. Tiun ĉi rubrikon la laboristoj plej ŝatis legi. Antaŭ nelonge, oni kritikis, ke kelkaj gvidantaj kadroj okupas tro multe da loĝspaco. Post kelkaj tagoj, en tiu rubriko oni raportis, ke la vicfabrikestro Li Guang-fu akceptis la opinion de la amaso kaj decidis cedi kvaronon de sia loĝejo. Vidinte tion, la laboristoj reskribis opini-afiŝon por lin laŭdi. En la Unua Ŝtata Kotonteksejo de Ŝanhajo multaj laboroj estis plibonigitaj laŭ la proponoj de la amaso. Ekzemple: la kvalito de la ŝpinajo produktita en la Suda Laborejo estis plibonigita, banekipajoj pliiĝis laŭ bezono de la laboristoj, vojo ofte sorbigita de akvo ripariĝis; kaj kontrolo grupeto stariĝis por inspekti la laboron de la kuirejo, kaj pliboniĝis la manĝaĵo. Tiuj ĉi novaĵoj estis publikigitaj en la opini-afiŝoj kaj la laboristoj diris: "La rektifa kampanjo estas ja bonega."

ĜOJIGA NOVAĴO DISVASTIĜIS TRA LA TUTA FABRIKO

Prezidanto Mao ĉirkaŭiris unu rondon laŭlonge de la pasejo de la fabriko kaj revenis denove antaŭ la administran domegon. Tiam la ĝojiga novaĵo "Prezidanto Mao alvenis" jam disflugis tra

la tuta fabriko, kaj ĵus finis sian laboron la laboristoj de la meza deĵoro, tial la laboristaj amasoj en ekstazo elpuŝiĝis el la laborejoj kiel tajdo. Pli kaj pli multe da laboristoj svarmiĝis ĉirkaŭ Prezidanto Mao kaj sennombraj varmaj manoj etendiĝis al li. Evidente Prezidanto Mao jam ne plu povis daŭre legi la opini-afiŝojn. Li ĉesis kaj svingadis sian manon por saluti kaj danki la pasian bonvenigon esprimatan al li de la laboristo-fratoj. Fine, en la nedisiĝema adiaŭado de la laboristoj li foriris de la fabriko.

Kiam Prezidanto Mao estis foririnta, la laboristoj denove amasiĝis antaŭ la opini-afiŝoj kaj ilin eklegis. Precipe tiuj laŭditaj de Prezidanto Mao altiris pli multe da legantoj. Posttagmeze, ambaŭflanke de la pasejo de la fabriko aperis multaj novaj opini-afiŝoj, kio antaŭdiris ke la granda debato tutfabrika flusos al nova kulmino.

1. *Gia laŭlitera traduko estas "rapida takto", kiu estas speco de populara versaĵo deklamata kun ritmomarka klakilo.*
2. *Simila al kuaiban, sed pli liberstila.*

Trad. PANDIŜO

KAMPO

mandu lin." La maljuna kooperativano, rondrigardis nin kaj ekridetis kvazaŭ dirante "Jen mi estas."

Kiam la grupestro foriris, la maljuna kooperativano montris al ni per sia manipulado kiel frakasi terbulojn, kiel ŝpari energion. Kiam ni ĉiuj laboris, li malrapideme refaldis siajn manikojn, demetis siajn ŝuojn, metis ilin sur la kampfino, kaj nudiginte siajn ostajn piedegojn li komencis labori kun ni ŝultron apud ŝultron. Sed iom post iom li antaŭiĝis. Ni junuloj ne volis postlasiĝi kaj kaŝe interkonsiliĝis: "Rap:du!" Sekve ni eklaboregis ne levante nian kapon, nek sin rektigante por mildigi la doloron en la talio, nek forviŝante la ŝviton. Per bova penado fine ni atingis lin. Ni faris longan elspiron. La maljuna kooperativano afable diris al ni: "Junuloj, vi laboras ne malbone, sed ne laboru tro forte, sed egalforte, alie, vi ne povus elteni. Nun estas nur la komenco de la labortago!"

Jam estis tempo por ripozo, ni ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ la maljuna kooperativano, kiu elprenis sian
(Daŭrigo sur P. 10)



MULTE FORTIĜIS

Lignogravuraĵo de Hu Chao-rung

Estu Klera Juna Kooperativano

La originala teksto de tiu ĉi letero de Zhao Shu-li, ĉina verkisto, aperis en la tagjurnalo Shanxi-ribao. Laŭ noto de ties redaktoro, lia filino jam decidis iri loĝiĝi en kamparon. Ŝi diris: "Nun mi decidis reiri al mia hejmvilaĝo por fariĝi klera juna kooperativano. Tie troviĝas amikoj dum mia infanaĝo, montoj kie mi kolektis ŝaf-fekajon kaj rivero kie mi lavis vestojn. Kiel mi sopiras labori sur tiu familiara tero."
—La red.

Kara Guang-jian,

Longe mi ne ricevis leteron de vi. Kiel vi progresas lastatempe?

Unu jaro jam pasis depost kiam vi forlasis vian lernejon. Dum tiu periodo trifoje vi ŝanĝis vian laborpostenon kaj finfine mi povas tiel diri, vi venis "proksime" al la laboranta popolo. Ĉar mi supozas ke sub la nunaj kondiĉoj via penso devas pli kaj pli disvolviĝi, tial mi volas fari iom da analizo pri la stato de via vivo kaj penso en la pasinta jaro, por ke vi ĝin prenu kiel referencon kiam vi alĝustigos vian vivon en estonteco.

Lastjare vi deziris iri al Xinjiang kaj mi konsentis. Kiam ni interkonsiliĝis pri tiu afero, vi rifuzis multajn proponojn de mi faritajn. Mi volis ke vi reiru al la hejmvilaĝo kaj partoprenu agrikulturan kooperativon, sed vi tute ne volis tion konsideri. Mi konsilis, ke vi aliĝu al la publika servantaro en Pekino kaj mi montris konkrete ke vi povas fariĝi bilet-vendistino, komizino, barbirino k.t.p. Vi petoleme respondis, ke vi vendos bileton



Kiam Eksonas la Sonorilego en Mateno

Papertranĉaĵo de Xy Jian

aŭ komercaĵon nur al paĉjo, tondos la harojn nur por paĉjo. Fakte vi ankaŭ tute ne volis tion konsideri.

Tiam, sekve de tio, mi diris ke vi malestimas la laborantan popolon, kaj vi eĉ incitiĝis ĉe tiuj vortoj. Mi supozas, ke vi nun jam povas tion rekonii. Sendube via penso tiam estis komplika, sed kiel ajn komplika ĝi estis, ĝia kerno povis esti nur de unu speco, nome "malestimu la laborantan popolon." Vi havis du pensajn balastajojn, unue, vi estas studento de supera mezlernejo; due, vi estas filino de kadro. Laŭ la mezurilo de sociaj profesioj heredita de la malnova socio, oni opinias, ke studentoj kaj kadroj estas superaj al aliaj homoj kaj ke tiuj kiuj partoprenas produktadon aŭ publikan servon estas krudlaboruloj, filistroj. Tiu malnova vidpunkto, kiu tute ne akordas kun socialismo, ŝtele eniris en la kapojn de multaj studentoj kaj gefiloj de kadroj. Malfeliĉe ankaŭ vi estas unu el tiuj kiuj akceptis tiun malbonan heredaĵon. Mi ne kredas ke vi estas tiel stulta, ke vi ne povus kalkuli monon se vi lernus la profesion de biletvendisto aŭ komizo, aŭ ke vi povus fortranĉi orelojn de viaj klientoj se vi lernus la profesion de barbiro. Vi ne volas fari tian laboron, ĉar vi timas renkonti viajn instruistojn kaj samlernejanon aŭ miajn kolegojn. Kaj se vi iros al la hejmvilaĝo kaj partoprenos agrikulturan produktadon, vi povos labori pli bone ol la urbaj junuloj kiuj neniam antaŭe vidis grenplantajojn. Sed vi ne volas iri tien, ĉar vi timas, ke parencoj kaj viaj junamikoj laŭ tiu nedezirinda malnova vidpunkto rigardos vin "sentaŭga". La gefiloj de la laboranta popolo kiuj, same kiel vi, estas studentoj de mezlernejoj, multe pli facile akceptos produktlaborojn aŭ serv-laborojn ol tiuj de la kadroj. Kvankam ankaŭ ili heredis la malnovan opinion pri profesioj, la gefiloj de kamparanoj nature iros labori en la kamparo kaj tiuj de barbiroj nature lernos tondi harojn kiam ili ne povos akiri la tiel nomatajn "superajn laborojn", aŭ eniri pli altgradan lernejon. Eĉ se ilia vidpunkto ne ŝanĝiĝis, tamen ili jam iras novan vojon. Kaj eĉ se ili estas iom malkontentaj, ili ne tiel hontas sian

laboron kaj sentas sin tiel humiligitaj antaŭ siaj konatoj. Tamen la gefiloj de kadroj ofte ne estas tiel seren-animaj, opiniante ke la filo ne povas fariĝi barbiro se la patro estas kadro. Sed ĉu estas ia malbono en tio, se mi laboras kiel verkisto kaj vi kiel barbirino? Kiam miaj haroj fariĝas longaj, mi petas vin tondi ilin por mi, kaj mi verkas novelojn por ke vi ilin legu. Ĉu tio ne estas racia divido de laboro en socio? La principon de egaleco ĉiu gradigito de mezlernejo povas ne nur kompreni sed ankaŭ priargumenti, kaj la gefiloj de kadroj povas priargumenti ĝin eĉ pli elokvente. Sed kiam ili elektas ian laboron kiel sian dumvivan profesion, ili ofte ne preferas produktadon pri kiu la plimulto sin okupas. Ĉu tio estas alie klarigebla se ne per “malestimi la laborantan popolon”?

Kiam vi revenis malsana de Xinjiang, mi daŭre konsilis, ke vi rekte partoprenu la produkt-laboron de agrikultura kooperativo, ĉu vi reiros al hejmvilaĝo, ĉu vi iros al Yungji. Vi diris ke tio estas “nereala”. Verŝajne per tio vi volis diri ke vi estas malforta kaj ne sufiĉe hardita. Tia kialo estas nepravigebla. En iu ajn organizo de produktado, la fizikaj kondiĉoj de ĝiaj anoj ne estas tute egalaj. Ĉiu el ili estas pli aŭ malpli forta ol la alia, tial ili faras malsamajn laborojn kaj ricevas diferencajn rekompencojn. En ĉiu kooperativo kaj en ĉiu fabriko estas homoj same malfortaj kiel vi aŭ eĉ pli malfortaj, sed ili ĉiuj reale partoprenas produktadon. Koncerne neharditecon, tio estas nur demando de la tempo kaj partopreno en produktado estas komenco de hardado. Ĉu ĝi povas esti pravigo por rifuzi produkt-laboron?

Poste mi kaj via pli aĝa frato konsentis ke vi iru al Yungji por serĉi alian laboron ol produktado. Tio estis nur provizora cedo sekve de malsukceso vin konvinki. Efektive vi ne kapablas labori kiel kadro. Kadro estas “nukleo” de la popolamaso. Li devas esti politike pli forta ol ili kaj bone hardita en produkto-batalo kaj klas-batalo. Prezidanto Mao diris ke en la mondo estas nur du kategorioj de scio: unu el ili estas scio pri produkto-batalo kaj la alia estas scio pri klas-batalo. Al vi kaj aliaj mezlernejanoj mankas ĝuste tiaj scioj, tial vi ĉiuj ne taŭgas por la posteno de kadro. En via lasta letero vi diris ke via nuna tasko estas mobilizi gradigitajn partopreni produktadon. Kaj vi mem estas ĝuste tiu kiun oni devas mobilizi. Ĉu tio ne estas materialo por humora dialogo de Hou Bao-lin*?

Mi kredas ke dum via laboro en vilaĝoj en la kelkaj pasintaj monatoj vi konatiĝis kun multaj

laborantaj popolanoj, lernis iom pri produktado kaj en via sento pliproksimiĝis al la laboranta popolo. Sed mi opinias, ke vi devas iri unu paŝon plu kaj fiksloĝi en iu kooperativo kaj fariĝi ĝia juna klera membro. Nur kiam vi vere partoprenos produktadon kaj vivtenos vin per labor-pago, vi povos kompreni profunde kiun etapon nia socialisma konstruado nun atingis kaj kiel ni devas progresi sur la nuna fundamento. Kaj vi povos profunde kompreni ke iu ajn problemo en produktado rekte rilatas al ni mem — al la vasta popolamaso. Kiam vi estos plenuminta iun taskon en produktado, vi certe trovos ĝojon en la produktado mem.

Mi aŭdis de viaj samlernejanoj ke vi antaŭnelonge skribis kelkajn artikolojn (mi ne demandis pri ilia enhavo). Tion mi ne kontraŭas, sed ankaŭ ne kuraĝas vin kuraĝigi senkonsidere. Mi ekamis beletron kaj ekprovis verki kiam mi estis dudekelk-jara. Sed mi komencis serioze verki nur post la aĝo de tridek ok jaroj. Oni povas verki en postlaboraj horoj kaj la plejparto de la estontaj verkistoj ankoraŭ venos el tiuj kiuj verkos libertempe. Sed oni devas distingi profesion de “kromlaboro”. La amo al profesio devas multoble superi tiun al verkado. Vi ja scias ke mi ŝatas ludi fluton kaj ludas ĝin tre mallerte. Sed mi ne ĉesas ludi pro mia mallerteco kaj ankaŭ neniam penos fariĝi fluto-solisto en koncerto (hejme mi ja povas ludi nur kiel “solisto”). Kaj tio estas amatoraĵo. Postlaboraj literatur-amatoroj devas preni tian sintenon rilate al verkado. Se ili bone verkos, iliaj verkaĵoj povos esti publikigitaj. Kaj se ili tre bone verkos, ili povos ŝanĝi sian profesion, same kiel mi povos ludi en koncerto aŭ partopreni orkestron, se mi tre lerte ludos mian fluton. Multaj junaj inteligentuloj partoprenintaj agrikulturajn kooperativojn skribis al mi, ke ili starigis antaŭ si la celon fariĝi verkistoj. Tion mi ne aprobas. Verkistoj povos deveni de agrikulturaj kooperativoj, sed se oni metus verkadon sur la unuan lokon, tiam produktado fariĝus “amatoraĵo”. Kiam multe da tiaj homoj partoprenas kooperativon, ili eble faros ĝin malgranda verkista asocio, sed ili ne havas grandan eblecon fari ĝin modela kooperativo.

Mi finu la leteron! Mi esperas, ke vi partoprenos produktadon kaj koncentrigos vian intereson sur la ĉefa okupo.

via paĉjo

*Hou Bao-lin — fama ĉina humordialogisto.

Tradukita de I. Ko



EN la regiono de Dungliang-monto en Wushan-gubernio, Gansu-provinco, dum multaj generacioj popularis mito:

Antaŭ multaj multaj jaroj en la suda parto de la gubernio, sur Laojun-monto vivis la dio Laojun. Vidinte malfacilecon de montregionaj kamparanoj pro manko de akvo, li ekkonstruis akvomuelilon sur deklivo de la monto kaj planis per ĝi konduki akvon sur la monton. Kiam akvo estis supren fluinta ĝis la monttalo, li demandis knabon ŝafopaŝtanta: "Ĉu vi vidis akvon supren fluanta?" Ne kredante, ke akvo povas flui supren, la knabo senhezite respondis: "Ĝi supren fluis, sed tuj denove malsupren fluis." Pro kolero pri tiu respondo dio Laojun forlasis la planon konduki akvon sur monton. Tial, sur Laojun-monto nun restas nur restaĵo de akvomuelila kanaleteto.

Kiam kamparanoj rakontis tiun ĉi miton, ili ĉiam plendis, ke la ŝafopaŝtanta knabo malsukcesigis feliĉigan aferon. Ili soife esperis, ke la mito fariĝos fakto.

En la printempo de la jaro 1956, en la distrikto de Dungliang-monto efektiviĝis altgrada kooperiĝo

Hao Chang-geng:

Konduki Akvon

de agrikulturo. La tiea gubernia komitato de la Ĉina Kompartio elmetis la devizon "Seka kampo transformiĝu, riza kampo surmontiĝu", decidis konduki akvon sur monton de la supra parto de Nie-rivero, enfluanto de Wei-rivero, kaj ŝanĝi 30 mil muojn da akvomanka tero en rizkampon. Tiam ne malmultaj personoj loĝantaj en la distrikto de Dungliang-monto dubis la eblecon konduki akvon sur monton 500 metrojn pli altan ol Wei-rivero. Maljunaj kamparanoj subdiris: "Oni sukcesus konduki akvon sur monton, nur kiam al putopulio elkreskus grimptigo, al ĉevalo kornoj kaj al korvo ruĝaj oreloj."

Tiam la kompartiaj filioj de agrikulturaj kooperativoj komencis mobilizi la popolamasojn, organizis diskutojn inter ili kaj konvinkis ilin pri la ebleco konduki akvon sur monton. Kaj je la

SUR LA KAMPO

(Daŭrigo de P. 7)

tabak-saketon, plenigis la pipon kaj ĝin prezentis al ni. Ni diris ke ni ne scias fumi. Kaj li bruligis la tabakon kaj komencis mem fumi.

"Avo, kiom da jaroj vi havas?" mi demandis.

"O!" la maljuna kooperativano ridetis, faris prengeston per tri fingroj kaj diris: "Mi havas tiun ĉi nombron da jaroj."

"Sepdek? Vi jam devas ripozi!"

"He, mi ne povas kutimiĝi al nenifaro. Ankaŭ la kooperativo petis min ripozi — fariĝi pensiulo; sed mi havas kutimaĉon, se mi ne laboras, mi malsaniĝas. Antaŭe kiam mi laboris por la bienuloj, mi ĉiam emis saboti, sed nun, kiam mi laboras por mi mem, naskiĝis al mi laboremo."

"Kamaradoj," la maljuna kooperativano starigis, ŝirmante la okulojn de sunbrilo per sia mano li ĉirkaŭrigardis la vastan ebenon. Kvazaŭ ion ekmemorante li diris: "Sen Prezidanto Mao kaj la Kompartio, mi jam antaŭ longe regalus hundojn per miaj maljunaj ostoj. Travivinte pli ol 60 jarojn nur nun mi trovas signifon en la vivo. Rigardu!" montrante al tegolaj domoj en la vilaĝo li diris: "Jen, tie estas la loko, kie mi antaŭe dunglaboris kaj suferis, sed nun ĝi fariĝis nia hejmo. Post la agrara reformo, la domo estis asignita al mi. Nun mi havas manĝaĵon, vestaĵon kaj loĝejon. Mi ĉiam ridetas kiam mi pensas pri

tio. Sed kiam mi ekmemoras la pasintan suferadon, larmoj plenigas miajn okulojn. La suferon eĉ unu trajno ne povas forporti!" La maljuna kooperativano subite ĉesis rideti kaj meditante diris malrapide kaj mallaŭte: "Dum tiu tempo mi manĝis manĝaĵon por hundoj kaj porkoj, sed laboregis kiel bovo kaj ĉevalo. Dum profunda vintro mi ne havis vatitan litkovrilon, sed nur eluzitan jutsakon por min ŝirmi, kaj devis tranokti en la bovstalo de la bienulo. Kion oni povis fari kiam estis malvarmege? Oni surmetis sur sin por-doklapon . . . La bienulo portanta peltan robon ĝojkontente diris: "Dormu kun la hundo, kies korpo vin varmigis." Li ne rigardis min kiel homon! Kaj oni diris ke antaŭ kelktempe dekstruloj diris, ke nun estas malpli bone ol antaŭe?" Ni ĉiuj kap-jesis.

"Hm, tio estas babilaĉo! Kio estas malpli bona ol antaŭe?" Tiam la maljuna kooperativano indigne frapante la teron per sia pipo laŭte diris: "Tio estas, ke la eksmastroj de la tegolaj domoj ne plu povas rajdi sur nin!"

"Vidu, kiel grasaj estas la brutoj de nia kooperativo!" sekvante al la montrofingro de la maljuna kooperativano, ni vidis bovon kaj azenon tiel grasajn kiel kneditaj el tero, ripozantajn sub la saliko. "Jen estas prospero de homoj kaj de brutoj!"

Ni diris al li, ke en nia institucio iu dekstrulo diris, ke la brutoj de la kooperativoj estas tiel

sur Monton

15-a de la unua monato laŭ luna kalendaro komenciĝis konstruado de Dungliang-kanaletoj kun unuavica partopreno de kompartianoj, membroj de la Komunisma Junulara Ligo kaj aktivuloj.

La konstruado de kanaletoj iris ne facile, ĉar en la regiono de Dungliang-monto multas valoj, ravinoj kaj krutajoj. Precipe en la malfacilaj lokoj de Hadesestra Roko kaj Infera Pasejo troviĝas multaj krutaj klifoj kaj profundaj abismoj, kiujn eĉ kaproj ne kuraĝas transsalti. Sed dank' al la kolektiva saĝo, la heroaj popolanoj ne nur sukcesis trairi la Serpent-monton, sur kiu troviĝas sennombraj serpentoj, kaj Shengmu-arbaron, sed ankaŭ forhakis la Hadesestran Rokon, trairis la Inferan Pasejon, Senfundan Kavernon kaj atingis Marĉovalon. Venkinte sennombrajn krutajn lokojn kaj multajn malfacilaĵojn

malgrasaj kiel skeletoj. Kiam li aŭdis tion, li ridegis: "Ili venu kaj vidu, ĉu estas tiaj skeletoj?"


"Kaj homoj kiaj vi," la maljuna kooperativano returniĝis al la antaŭa temo, "en la malnova socio neniam vizitis nin eĉ se ni invitis ilin kun granda ceremonio; por ne diri, ke provincestro helpas al ni semadi la tritikon, eĉ oficistoj de malalta rango, vidante kamparanojn tuj foriris ŝtopante al si la nazon. Sed nun estas alie. Ni ĉiuj estas kvazaŭ de unu granda familio, ha, ha!" dirante tion la maljunulo eksplodis per ĝoja rido. "Tiutage iu buroestro eĉ propramane helpis al ni disŝuti sterkon!" Li memoris ion, kaj turnis sian vizaĝon al la ĉielo: "Prezidanto Mao ĉion pripensas. Kiam en kamparo ne sufiĉas laboruloj, li sendas al ni helpantojn. Tio ja estas alsendi ligno-karbon en neĝo, helpo plej ĝustatempa."

Mi ne scias kial, aŭdinte la parolon de la maljunulo, subite ni vigliĝis. Laciĝo tute malaperis. Je ies iniciato ni ĉiuj demetis la ŝuojn kaj ŝtrumpojn, alte refaldis niajn pantalon-tubojn, kaj eklaboris kun du nudaj blankaj piedoj laŭ la maniero de la maljunulo.

La maljuna kooperativano palpante sian barbon, ĝoje sed zorgeme konsilis al ni: "Prizorgu vian sanon! Ne ellacigu vin!"

Al li respondis la des pli intensa batbruo de terhakiloj.

Tradukis: ĈEN ĈAŬ-JIN



finfine ili sukcesis konstrui Dungliang-kanaleton longan je 60 lioj ĝis Baijia-monto. La mito mil-jara fariĝis fakto. La loĝantoj diris ekscitite: "Akvon, kiun ne povis supren konduki dio Laojun, supren kondukis la Kompartio." De tiam Dungliang-monto ne plu suferas de trosekeco kaj la loĝantoj postulis ŝanĝi la vilaĝnomon Baijia-monto al Baijia-rivero.

Post la surmontigo de riverakvo aperis mirakloj: rizo, kiun kulturi oni eĉ ne sonĝis antaŭe, rikoltiĝis je 360 ĝinoj po muo da tero, la plej alta produkt-kvanto de kanabo po muo da tero atingis 307 ĝinojn, unu kukurbo pezas 73 ĝinojn kaj produkto de greno en Hojiawan-vilaĝo plialtiĝis je pli ol 10 mil ĝinoj. La vivo de la loĝantoj en la regiono de Dungliang-monto pli kaj pli boniĝas. Kaj ili klopodos en la jaro 1958 efektiviĝi irigacian projekton de la tuta kulturata areo en sia mont-regiono. Ili ankaŭ planas konstrui hidroelektran stacion kaj per ĝi ĉiam lumigi Dungliang-monton.

Elĉinigiĝis G.



Portreto de Qi Bai-shi

Pentris Huang Yungyu

EN la jaro 1861 naskĝis Qi Bai-shi en malriĉa kamparana hejmo en Xiangtan-gubernio, Hunan-provinco. Lia patro estis nomata Shi-wen kaj lia patrino devenis el familio Zhou. La tuta familio sin vivtenis per terkulturado kaj teksado. S-ro Qi Bai-shi estis lernema en sia infanaĝo, kaj en la aĝo de ses aŭ sep jaroj li jam povis bone memori la ideografojn kiujn lia avo instruis al li skribante per fajroprenilo en cindro. Kiam li estis okjara, lia patrino aĉetis por li paperon, penikon kaj libron per sumeto da mono kiun ŝi sukcesis pene ŝpari kaj lin sendis al sia patro por lerni. Tamen apenaŭ pasis unu jaro kiam li devis ĉesigi la lernadon pro manko de laborforto en la hejmo. Sekve kiel ĉiuj aliaj kamparaj junuloj, li komencis partopreni en tre juna aĝo la hejman produktan laboron, helpante sian patron paŝti bovon aŭ dehaki hejtlignon.

Dum libertempo post laborado, li tre emis pentri kaj lerni ĉinan kaligrafion. Pro sia malriĉeco li havis neniam alian materialon sur kiu li povis ekzerci pentradon kaj skribadon ol la paperfoliojn detranĉitajn de uzitaj kontlibroj. Vidinte lian obstinan lernemon, la avino foje ĝemkriis: "Kvar tagojn pluvos, tri tagojn blovas, kiu ja verkojn kuiri povas? Se ne estos rizo morgaŭ, kion vi faros?" Sed malfacileco ne povis lin timigi, nek mizera vivo malhelpi lian volon al lernado. Ĉiam, kiam li paŝtis, li pendigis libron sur kornon de bubalo kaj legis paŝtante. Jam de sia infanaĝo li havis la fortikan karakteron partopreni en laborado ne forlasante lernadon.

Kiam li estis dekdu-jara, ĉar li estis tre malforta kaj ne taŭgis por terkulturado, lia patro sendis

Caj Ro-hong:

VIVO

— Biografieto

lin al ĉarpentisto Qi Man por metilernado. Komence li lernis ordinaran ĉarpentadon. Post kiam li estis dekkvinjara, li eklernis meblogravuradon, t. e. gravuri delikatajn desegnojn sur mebloj. Ĉar lia arto en gravurado estis altnivela kaj lia karesnomo estis A-zhi, la samvilaĝanoj kutimis intime nomi lin "Ĉarpentisto Zhi."

Dum dekkelkaj jaroj Qi Bai-shi laboris kiel lignajisto kaj dum tiom da jaroj li lernis pentradon. Nur kiam li estis dudeksep-jara, li konatiĝis kun

la lokaj elstaraj literaturistoj kaj pentristoj, ofte petis de ili instruon, kaj iom post iom akiris inspiron pri versfarado, prozverkado kaj teorio de pentrarto. Ekde tiam li malfermis al si sur la bazo de labora vivo sian artistan karieron. Li ne nur lernis skribi poemojn kaj gravuri sigelilojn, sed ankaŭ fariĝis pentristo, pentrante portretojn por la samvilaĝanoj. Fidela kaj penema li estis en lernado. En vesperoj kiam li ne povis sin provizi per lampoleo, li legis sub la lumo de brulanta fasketo de sekaj pinbranĉetoj. Por ekzerci la arton de sigelil-gravurado, li plurfoje defrotis la gravuritajn ideografojn sur la ŝtonpeceto por gravuri denove. Rilate al pentrado, Qi Bai-shi havas sian propran opinion. Li alproprigis la bonajn kvalitojn de antikvaj artistoj, kaj temen li neniam neglektis sian propran kreadon. Forte li kontraŭstaris kontraŭrealajn fantaziojn kaj emfazis observadon al fenomenoj en la reala vivo. Li konstante atentis pri la karakterizoj de birdoj, bestoj, insektoj kaj fiŝoj, enpensiĝis pri ilia spirito kaj pripentris iliajn movmanierojn. Iam li diris, "Mi faras portretojn por miloj da insektoj kaj reprezentas la spiriton por centoj da birdoj, escepte la drakon, kiun mi neniam vidis kaj sekve ne aŭdacas ĝin pentri." Tio montras ke de sia junaĝo Qi Bai-shi jam formis sian realisman vidpunkton, kiu metis fortikan bazon por lia arta verkado en postaj jaroj. Lia arto strebis ne nur al ekstera simileco, sed ankaŭ al spirita simileco. Li ne nur konservis la esencojn de la esprimtekniko de antikvaj pentristoj, sed ankaŭ posedis sian propran stilon.

Depost la aĝo de kvardek jaroj, S-ro Qi vojaĝis kvin fojojn al diversaj pitoreskaj lokoj tra tuta

LABOREMA

de la granda artisto Qi Bai-shi —

Cinio. Je la famkonataj Kvin Sanktaj Montoj, la Montgorĝoj de Yangzi-rivero, Dungting-lago, la Perlo-rivero, la baseno de la Flava Rivero, ĉie estas liaj piedsignoj. Dum la turismo li faris multajn etudojn de pejzaĝoj kaj poste el ili ellaboris bildalbumon de pli ol kvindek pecoj da pentraĵoj, kiu titoliĝis "Pentrajkolekto de Jie-shan", la pli fama el liaj fruaj verkoj.

Kiam S-ro Qi estis 50-jara, la interbatalado de la militaristoj devigis lin rifuĝi en Pekinon, kie li sin vivtenis per sigelil-gravurado kaj pentrado. Depost la aĝo de sesdek jaroj, li daŭre loĝadis en Pekino, lekciante kiel profesoro en la Pekina Art-instituto. Ekde tiam lia artista kapablo ĉiam pli maturiĝis, kaj li kreis grandan kvanton da verkoj de diversaj specoj: versfarado, sigelil-gravurado, kaligrafio kaj pentrado, kaj neniu el ili estas ne eminenta. Multflankaj estas la temoj de liaj pentraĵoj: pejzaĝoj, floroj, birdoj, insektoj, homfiguroj, el kiuj ĉiu atinginta tre altan nivelon de belarto. Liajn verkojn penetris simpla deziro de la laboranta popolo al la reala vivo. Per delikata kaj ekzakta tekniko li esprimis tiujn viglajn vivadojn elmontrante sian ardan amon al la vivo. Per koncizaj kaj enprofundiĝintaj peniktuŝoj li prezentis al la rigardantoj majestajn montojn kaj riverojn elmontrante sian profundan amon al la naturo. Li ankaŭ ofte pentris homfigurojn per akra aluda karikaturo, esprimante sian abomenon kaj malkontenton al la tiama politika cirkonstanco. Unuvorte, lia artista penso estas nedisigebla de la pensoj kaj sentoj de la laboranta popolo kaj liaj artaj figuroj estas ankaŭ al ili familiaraj. Kaj tio formis la karakterizojn de la artista vivo de S-ro Qi Bai-shi.

Post kiam Pekino estis okupita de la japanaj imperialistoj en 1937, li forlasis la profesoran katedron de la Pekina Art-instituto. Spite de tio ke li ne havis hejtajon dum frosta vintro, li resendis la karbon kiun la Instituto al li donis, preferante frostiĝi ol akcepti favoron de la pupa regpotenco. Sur la pordo de sia hejmo li gluis la sekvantan afiŝon: "Pentraĵoj ne Vendiĝas al Ŝtataj Oficistoj", per kiu li malpermesis al tiamaĵn altrangulojn eniri lian domon. El tia konduto


oni povas vidi la neŝanceligeblan lojalecon de Qi Bai-shi al la patrio.

Estis ne malfacile por la maljunulo multe suferinta de malriĉeco kaj milito, trovi el siaj travivaĵoj la veron: nur tiu kiu staras en la vico de la laboranta popolo, havas brilan estontecon kaj nur tiu kiu laboras por la bono de la laboranta popolo, estas efektive fidinda homo. Ĉar tia li estis, tial tuj post la liberiĝo de la tuta lando en 1949, li trovis la veron en la kontakto kun aktuala vivo. Li tutkore bonvenigis la liberiĝon de la ĉina popolo kaj ekde tiam ricevadis ĉiajn prizorgojn de la Partio kaj registaro. Ŝajnis ke li multe juniĝis, kaj ankaŭ lia verkemo pli kaj pli kreskis. Li pentris kaj dediĉis al Prezidanto Mao grandegan pentraĵon, en kiu li simboligis la Komunistan Partion kaj la grandan gvidanton de la ĉina popolo per la suno, gruo kaj pino, same kiel la ĉina laboranta popolo glorigas la Partion kaj Prezidanton Mao.

En la jaro 1952, okaze de la malfermiĝo de la Paca Konferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj en Pekino, li verkis grandan pentraĵon kun diversaj floroj kaj pacaj kolomboj por prikanti pacon.

S-ro Qi Bai-shi fariĝis honora profesoro de la

Pentraĵoj de
Qi Bai-shi



Centra Akademio de Belartoj kaj estis elektita ano de la Prezidentaro de la Federacio de Literaturaj kaj Belartaj Rondoĵoj en Ĉinio. Grandkvante eldoniĝis liaj verkoj, vaste koniĝis lia nomo kaj internacian reputacion li akiris.

La 7-an de januaro, 1953, la Ministerio de Kulturo honoris lin per titolo de Popola Artisto. En oktobro samjare, li estis elektita prezidanto de la Ligo de Ĉinaj Artistoj. En 1954 li estis elektita reprezentanto al la Tutlanda Popola Kongreso. Ĉefministro Otto Grotewohl de Demokratia Germanio persone transdonis al li en Pekino la honoran diplomon de Koresponda Akademiano de la Akademio de Artoj kaj Sciencoj de Demokratia Germanio en 1955 kaj en la sekvanta jaro la Konstanta Komitato de la Mondpaca Kongreso decidis ke S-ro Qi Bai-shi estu unu el la ricevantoj de la Internacia Pacpremio por 1955.

Lastatempe pro la grandaĝeco li fartis multe

pli malbone ol antaŭe, sed en la lasta jaro li ankoraŭ verkis tricent ĝis kvarcent pentraĵojn.

Je la 16-a de septembro, 1957, forpasis S-ro Qi Bai-shi en la Pekina Hospitalo.

La tuta vivo de S-ro Qi Bai-shi estis vivo laborema, vivo de neelĉerpeble riĉa artista verkado. Lia preskaŭ centjara vivo estis saturita de la bona kaj solida karaktero de la ĉina laboranta popolo. Liaj artaj atingajoj estas senmorta trezoro en la arta trezorejo de Ĉinio kaj la tuta mondo. Lia eminenta servo al la defendo de paco ankaŭ enskribis brilegan paĝon en la historio de la batalado por longdaŭra mondopaco. Lia nomo ligiĝos por eterne kun la ĉina laboranta popolo kaj ĉiuj pacamantoj tra la tuta mondo. Tio estas senkompara gloro de S-ro Qi Bai-shi, kaj ankaŭ de ĉiuj en Ĉinio kiuj batalas por la paco kaj la feliĉo de la homaro.

Trad. Ciponin

Li De :

La Petrolminejo de Yumen dum Ok Jaroj

PRIPAROLANTE nian petrolan industrion, oni tre nature turnas sin al la petrolminejo en Yumen, kiu nuntempe estas la plej granda produkta bazo de natura petrolo en nia lando. Post ok-jara renovigo kaj pligrandigo, la petrolminejo en Yumen jam fariĝis grandskala petrolkombinato konsistanta el la fakoj de geologia esploro, drilado, ekspluato, rafinado, maŝinmuntado, konstruado de petrolkampo kaj scienca studado de petrolo ktp.

La petrolminejo situas en la urbo Yumen, en la okcidenta parto de Gansu-provinco; ĉirkaŭ 50 kilometrojn okcidente de la fino de la Granda Muro — Jiayu-pasejo, en la dezerto Gobi ĉe la piedo de la monto Qilian. Laŭ priskribo en dokumenta literaturo, en la jaroj de Sui- kaj Tang-dinastioj, la garnizono de la urbo Shaicheng plurfoje venkis la atakantan malamikon per disversado de petrolo de la supro de la urbomuro. Tamen, tiu ĉi petrolkampo estas trovita nur en la jaro 1936, ĝis nun ĝi havas historion nur de dudek jaroj; kaj la grandskala konstruado kaj ekspluato efektiviĝis nur en la jaroj post la liberiĝo.

Antaŭ la liberiĝo, dum la regado de Kuomintang, la tuta petrolkampo posedis nur tri drilmaŝinojn malgrandatipajn kaj kelkajn malnovajn kablodrilojn, kies drilkapablo ne atingis mil futojn en profundeco, tial granda kvanto de nafto estis forlasita en la profundo de la tero. La malmultaj drilmaŝinoj pro manko de kontraŭfrostaj


ekipaĵo, ĉesis funkcii duonon de la tuta jaro. Kaŭze de la senplana drilado de petrolputo kaj senplana ekspluato, la petrolkampo estis detruita, kaj konstante okazis akcidentoj de elŝprucado kaj brulego. La brulego en 1942 plagis la plejparton de la petrolkampo. Nafto ĉien disfluis kaj grandkvante forportiĝis de riverakvo. Kiam la petrolputo ĉesis mem elŝprucigi, oni simple ĝin ŝtopis senzorge. Tiam multaj el la laboristoj tie laborantaj estis perforte varbitaj. Malsato, malsano kaj morto ĉiam ilin minacis; spionoj, ĝendarmoj, policianoj ilin observadis.

Nur ok jarojn post la liberiĝo, la trajtoj de la petrolminejo jam tute aliiĝis. Kaj ŝanĝiĝas ĉiutage ĝia aspekto. La sufokitaj petrolputoj reviviĝis. Sur la montoj kaj la ebena stariĝis novaj drilturoj. La nigra nafto fluas senĉese tra la oletubo en la distilstacion el la mil metrojn profunda interno de la tero. La produktokvanto de nafto en 1957 dekoble plimultiĝis ol tiu en la jaro 1949. En la rafina fabriko la rafinkvanto de petrolo jam kvaroble plimultiĝis kompare kun tiu en 1949. La sukcese provfabrikitaj petrolaĵoj jam plimultiĝis ĝis 32 specoj. La sumo investita de nia registaro al la petrolminejo pligrandiĝas ĉiujare. Ekzemple, la sumo investita por 1956 estas 61 obloj de tiu por 1950. Nur en la jaro 1956, nia registaro nove konstruis kaj pligrandigis ĉi tie kelkdek distilstaciojn, nove konstruis kelkcent petrolrezervujojn, pligrandigis kvin akvoenpumpojn, finkonstruis grandiozan gudrigan

fabrikon, kaj instalis diversajn tubliniojn por oleo kaj gaso entute 304 kilometrojn longajn kaj kabloliniojn 300 kilometrojn longajn.

Sekve de la eltrovo de la granda petrolkampo en Klamai, Xinjiang-provinco, la grandskala esplorado en Chaidam-baseno de Qinghai-provinco, la grandskala ekspluato de naturaj olegasokampoj en Sichuan-provinco, kaj la esplorado en aliaj teritorioj kaj la responde al ĝi ekkonstruado de la industrio de rafinado kaj petrolmaŝinoj, la petrolminejo en Yumen, kiel la unua bazo de natura petrolo en nia lando, prenas sur sin ankaŭ la grandan taskon por kulturi konstruantojn de petrolindustrio. En 1956, la petrolminejo en Yumen forte subtenis la disvolvon de petrolindustrio per livero de ĉirkaŭ 6200 teknikistoj kaj laboristoj al frataj minejoj aŭ fabrikoj.

La disvolvo de la petrolminejo en Yumen estus nebla sen la helpo de Sovetunio kaj la popoldemokratiaj landoj, kaj la forta subteno de la popolo en la tutlando. Antaŭ ok jaroj, kiam la petrolminejo komencis reviviĝi, specialistoj de Sovetunio jam venis al la soleca dezerto de Gobi. Pli poste, alvenis ankaŭ specialistoj de Rumanio, Ĉeĥoslovakio kaj Demokratia Germanio. Dum la ok pasintaj jaroj ili laboradis sinforgese por helpi nian konstruadon de petrolindustrio. Per kia forto elŝpruci la petrolon el la tero, estis grava problemo nesolvita dum multaj jaroj, sed la specialistoj de Sovetunio jam ĝin solvis por ni. Sovetiaj specialistoj ankaŭ helpis nin apliki la sciencajn metodojn por ekspluatado kiel enpumpado de aero en la supran parton de petrolkampo, enpumpado



Nokto en Yumen

Foto de Hu Yue

de akvo ĉe la randoj, disbreĉigo de petroltavolo, ktp., kiuj plimultigis konstante la produktokvanton de nafto. Samtempe, la popoldemokratiaj landoj ankaŭ liveris al ni grandan kvanton da diversaj novaj ekipaĵoj kaj materialoj, kiel esplorilojn kaj grandatipajn drilmaŝinojn.

Nuntempe, la petrolminejo en Yumen jam ne kuŝas solece en la dezerto de Gobi, sed fariĝis industria urbo kun 70,000 loĝantoj. Nokte, ekriĝante malsupren de sur la monto Qilian, oni vidas maron da elektraĵoj, pli densaj ol la steloj sur la ĉielo. Tie, kie brilas la lampoj, estas aŭditorio, hospitalo, ĵurnalejo, radiostacio, biblioteko, poŝtoŝtelo, butikoj. . . Tiuĵ, kiuj loĝas ĉi tie povas akiri diversajn vivnecesaĵojn, havigi al si manĝaĵojn el multaj lokoj, kaj ofte viziti kinejon kaj teatron.

Trad. ĈOU LI

Kabano de Du Fu

(Daŭrigo de P. 24)

de la ĝardeno. Milda venteto alblovas de tempo al tempo aromon de lotusfloroj, kaj balanciĝadas en ĝi gracilaj bambuetoj — jen estas sceno kian pri-skribis la poeto:

*“Zefiro karesas la sveltajn bambuojn smeraldajn
Pluveto brakumas la florojn lotusajn aromajn.”*

Antaŭ pli ol 1100 jaroj, Du Fu verkis en la kabano multajn versojn pri la naturo, ekzemple:

*“Gracilas la branĉoj de salikoj
Aromas la paroj de lokvatoj.”*

Kaj

“En silka pluvo fiŝoj naĝas elen.

En milda vent’ hirundoj flugas kline.”

k. a. kiujn oni ŝatas citi. La poeto ankaŭ ofte aludis sociajn malbonojn per vegetaĵaj malsanoj kiel ekzemple en la poemoj “Malsana Oranĝarbo”, “Vel-

kanta Palmo” k. a. Kiom li estis en Chengdu, li vivis tre mizere. Li devis sin turnadi al konatoj por helpo, kiel li skribis:

*“Al mastroj mi devas paroli kun rido nevola,
Kun trist’ mi la vivon pripensas — cent zorgoj
ekbolas.”*

Iunokte en septembro de la jaro 760, la kabano de Du Fu detruigis de uragano, kaj rompiĝis ankaŭ la nanmu-arbo antaŭ la kabano. En tiu nokto sendorma, la poeto verkis la poemon “Kanto pri la Detruo de la Kabano en Aŭtun-uragano.”

Du Fu verkis dum sia vivo multajn majestajn poemojn. Tio rezultiĝas el la seriozeco de la poeto en verkado. En poemeto li skribis:

*“Inklin’ al bonaj versoj — mia emo,
Por trafa vort’ obstinas mia peno.”*

Kvankam la granda poeto jam forlasis nian mondon antaŭ pli ol mil jaroj, sed liaj poemoj estas kaj estos ĉiam deklamataj kaj ŝatataj de la popolo.

Trad. I. U.

Neforgesebla Hindio

MI jam eksciis Hindion kiam mi estis nur kvar- aŭ kvin-jara, ankoraŭ ne scipovante legi. Mia patrino rakontis al mi la legendon pri la pilgrimado de budaisma monaĥo Xuanzhuang en Tang-dinastio kiu iris tien por alporti la sutron returnen. Ŝi diris: “En la okcidento estis bela lando kun verdaj montoj kaj bluaĵaj riveroj, kie vivis belaspektaj kaj lertaj homoj, inter kiuj estis multaj eminentaj saĝuloj. La lando estis nomata Tianzhu*. “Plenaĝiĝinte mi iom post iom sciis ke multaj belaj aĵoj enportitaj de tiu lando: gravuraĵoj, poemoj, sanktaj skribaĵoj, brilaj mitoj, hindaj silkajoj kaj santalincenso ellasanta ŝveban fumon en la hejmo okaze de festotagoj, ĉio ĉi tio ornamas nian vivon, ke kiam ajn mi ekpensis pri Hindio, vekigis en mi intima kaj agrabla sento.

Ĉiu ĉino havas tian senton. Dum la du mil jarojn longa historio de interriliĝo inter Ĉinio kaj Hindio, aŭdiĝis nenia batalkrio. Iris kaj venis inter la du landoj nur pacaj delegitoj por scio, kulturo kaj prospera vivo. Tiaj bonaj kaj harmoniaj najbaroj estis unikaj en la historio.


Se oni povas kompari la kulturan interfluan inter Ĉinio kaj Hindio al la tage kaj nokte seninterrompe fluantaj Ganĝo-rivero kaj Jangzi-rivero, do oni ankaŭ povas kompari la du liberigintajn popolojn hodiaŭ al la du milmejlaj torentaj riveregoj kunfluigintaj en senliman ĝojtumultan oceanon.

Ĉefministro Zhou En-lai diris al la hinda popolo: “Ni povas deklari sen troigo, ke hodiaŭ la amika interrilito inter ni superas tiujn en iu ajn epoko de la historio.” Li eldiris ĝuste kion ĉiu el ni volas diri el nia koro.

En Ĉinio sin trovas kompara esprimo deveninta

**La antikva nomo de Hindio en la ĉina lingvo.*

La fama maŭzoleo Itmad-ud-daŭla en Agra



de Hindio pri granda nombro: “multegaj kiel la sableroj en Ganĝo-rivero”. Kaj ĝi ja povas esti uzata por esprimi la multecon de intervizitintaj ĉinaj kaj hindaj artistoj, poetoj, kantistoj, dancistoj, sciencistoj, prelegantaj profesoroj kaj alilande lernantaj studentoj depost la liberiĝo.

Ĉiuj, kiuj jam vizitis Hindion, neniam povas forgesi la varman sentimenton de la hinda popolo al la ĉina popolo. Kiam nia aeroplano alteriĝis al la aerodromo de la blua ĉielo super Nova Delhio, nin bonvenigis maro da ardaĵaj homamasoj, gajaj ridoj kaj brilaj amindaj okuloj plenaj je amikeco. Neniam antaŭe mi vidis tiom da belaj, kvazaŭ post longa disiĝo renkontiĝantaj karuloj. Petaloj supersutiĝis sur niajn kapojn. Mi ne povis nomi la florojn, nek klare vidi kiom da molaj brakoj metis floringojn ĉirkaŭ niajn kolojn. Niajn vertojn oni aspergis per florakvo, kaj sur niajn fruntojn oni faris punkton per karega ruĝa pudro. La vojon oni kovris per ruĝa tero por bonvenigi la gastojn venintajn de la alia flanko de Himalaja-montaro. Ni ĉinoj estas el multaj nacioj, dum en Hindio sin trovas diversaj lingvoj; ni ne povas paroli unuj kun la aliaj, sed renkontiĝinte, ni tuj balancante la kapon kaj kunfrapante la manojn ekkantis ekscitite: “Hindi Ĉini Bhai Bhai (Hindio kaj Ĉinio estas fratoj)”, ĉar tiu ĉi arda kanto povas efektive elkanti la bolantan emocion en niaj koroj.

Kien ajn ni iris, urbegon, urbeton, vilaĝon aŭ fabrikon, ni renkontis same komplezan kaj pasian parolon kaj bonvenigon. La sennombraj steloj sur la hinda ĉielo estas tiel belaj kiel la multaj reliefoj, konstruaĵoj, fontanoj, ĝardenoj, freskoj, palacoj kaj kasteloj sur la hinda tero, sed pli ravaj estas la koroj de ĉiuj hindaj amikoj.

Kiam ajn ni alvenis iun urbon, nin invitis sennombraj hindaj amikoj loĝi ĉe ili kaj gaje interbabili kun iliaj familianoj. Multajn fojojn dum bele tristikaj vesperkunvenoj, multaj poetoj tiel bone deklamis al ni siajn novajn kortuŝajn poemojn pri amikeco, kvazaŭ ili estus babilantaj kun siaj multjaraj amikoj. Kiel ĉarmaj estas la hindaj muziko kaj danco! Ĉu en urbegoj ĉu en urbetoj, la muzikistoj kaj dancistoj alportis al ni elkoran ĝojon kiel feinoj. “Petalsimilaj manoj, bolidaj okuloj, elparolantaj amikecon inter ni,” skribis la poeto Yuan Shui-pai.

En la hindia lingvo la elparoloj de “sukero” kaj “Ĉinio” estas tre similaj. Tial niaj hindaj amikoj

ridante diris: "Pripensante ĉinojn, ni tuj havas dolĉan senton." Pri hindoj, la ĉinoj havas saman senton. Kiam ni ekpensas pri hindoj, ni tuj sentas ilian trankvilecon kaj intimecon kiel senlime vastan lagon de saĝo. Interparolante kun hindaj amikoj, ni sentas ke ili estas alte kulturitaj kaj elokventaj, afablaj kaj amindaj, ĉiuj kun tre inteligentaj okuloj.

La arda pasio de la hinda popolo estas eksterordinara. Vizitante urbetojn kaj vilaĝojn de Hindio, des pli ni sentis ilian marprofundan pasion al la ĉina popolo.

Verkisto kiu iam vizitis Hindion rakontis al mi, ke kiam ili veturis per omnibuso kaj preterpasis urbeton, ili haltis por momento. Vidinte neatendite amikojn el nova Ĉinio, ĉiuj kamparanoj, kolportistoj, oficistoj de la aŭtoriparejo kaj arganistoj alkuris ilin saluti, tiel varme, kompleze kaj ceremoni-plene ke tiu momento de naiva, arda kaj sincera interrenkontiĝo restos por ili eterne neforgesebla.

Kiam la ĉina delegacio vojaĝis en vagonaro al diversaj lokoj tra Hindio, ĉiuj stacioj sur la vojo, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, estis tute plenigitaj de homamasoj. En ĉiu stacio bonvenigis nin viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj, altlevante girdandojn, aspergante per florakvo kaj kantante belajn kantojn. Meznokte, sub la hinda ĉielo kun sennombraj steloj palpebrumantaj kiel gemoj, ili atendis nian vagonaron sur la perono kun torĉoj aŭ lanternoj en la manoj. Kelkfoje ni preterpasis dum unu nokto multe da tiaj stacioj, grandaj kaj malgrandaj.

Iun fojon, kiam ni estis ankoraŭ tre dormemaj, la vagonaro haltis. Multaj manoj frapetadis je la vagonpordoj. Ni rapidis elsalti el la vagonaro kaj vidis grandajn brilantajn okulojn de sennombraj hindoj ridetantaj al ni sub la matenkrepuska ĉielo. La bonvenigantoj transdonis al ni donacojn, ŝmiris la bonajn amikojn el Ĉinio per balzamo kaj en la blovado de malvarmeta venteto oferis al ĉiu elvagoniĝinta gasto tason da varma kafo. Kantoj, ridoj, senlime ĝojaj sentimentoj kaj neelĉerpebla komplezemo kaj amikeco.

Sed ekfajfis la lokomotivo kaj ni ekrimarkis ke en palpebruma daŭro jam forpasis la kelkaj minutoj de haltado. En ekstrema ekscitiĝo kaj dankemo ni eĉ forgesis demandi, "Kio estas la nomo de tiu ĉi urbo?" kaj jam disiĝis de tiuj homoj kun flamantaj amikaj koroj.

La vagonaro malproksimiĝis. Sed en la krepuska matenlumo ni ankoraŭ vidas grandan amason da homoj, al ni nekonataj, sed kun ni kunligiĝantaj, svingantaj manojn al ni aŭ levantaj siajn infanojn. En malproksimeco venteto flirtigas iliajn iom post iom malgrandiĝantaj kaptukojn kaj sari-



Kamala Lakshman dancanta Foto de Wu Hua-xue

ojn. Niaj okuloj pleniĝas je larmoj, niaj koroj postlasiĝis ĉe ili. Kvankam ni ne konas la nomon de tiu ĉi urbo, tamen ni scias ke tio estas ja Hindio, tio estas amo de milionoj da hindaj popolanoj al la vizitantoj el nova Ĉinio.

"Donu al ĝi ĉinan nomon!" petis nin tiom da junaj patrinoj hindaj, kiuj deziris ke ni postlasu ĉinan amikecon al iliaj suĉinfanoj. Kiel amindaj estas la hindaj infanoj kun siaj longaj okulharoj kaj grandaj brilenigraj okuloj elsendantaj neordinaran brilon. En multaj infangardenoj ni vidis ilin gaje kantantaj hindajn infankantojn aŭ prezentantaj hindajn dancojn. Ili vekis nian rememoron pri la infanoj en la patrio. La infanoj parolantaj malsamajn lingvojn kaj portantaj diferencajn kostumojn ambaŭ ŝatas renkonti gastojn de malproksimaj lokoj, kaj vidinte la gastojn ili kutimas etendi siajn grasajn braketojn, aklamante kaj kriante, kvazaŭ al ili venus karuloj.

Nia tempo en Hindio estis tiel valora ke ni dezirus porti hejmen plenĉarojn kaj plenbuŝelojn da akirita scio kaj saĝo por disdoni al niaj parencoj kaj amikoj. Ciu loko en Hindio estas tiel bela.

ĉiu loko estas kvazaŭ sceno en sonĝo. Ni ne povas forgesi la rozruĝan urbon Ĝaipur. Ni ne povas forgesi la majestan kaj grandiozan Aĝanta kaj la serenon, mirindan kaj poezian Taĝ Mahal. En kelkaj lokoj la pavoj estas tiel multaj kiel kokoj. En aliaj ĉie flugas papagoj kiel kolomboj. Sed tio kion ni memoras por ĉiam estas la majesta kaj belega Nova Delhio. La vastaj razenoj, la grandaj konstruaĵoj, la Prezidanta Domo konstruita el ruĝaj sabloŝtonoj, la Parlamentejo de hinda stilo kaj karaktero de moderna arĥitekturo en harmonio kaj sennombraj antikvaj restaĵoj kaj pitoreskaj lokoj — ĉio ĉi rememorigis nin pri nia Pekino.

La konstruado de la hinda popolo post sia sendependiĝo sentigas al ni fieron por Hindio. - La Bakhra-Nankar-a irigacia sistemo, la vagonfabriko apud Madras kaj multaj aliaj grandiozaj konstruaĵoj ĝojigis nin senlime. La pacama kaj kantema hinda popolo estas marŝanta antaŭen sur la vojo de moderna industriigo.

En la lastaj jaroj, granda kvanto da hindaj poeziaĵoj, noveloj, dramoj kaj prozoj estas tradukitaj en la ĉinan lingvon kaj estas varme laŭdata kaj ŝatata de la vasta ĉina legantaro. La hindaj muziko, danco kaj kinobildoj jam fariĝas parto de nia vivo. Ne nur niaj kantistoj, sed ankaŭ studentoj kaj infanoj povas kanti unu aŭ du de ili ŝatatajn hindajn kantojn. Niaj radiostacioj ofte disaŭdigas hindan muzikon kiu estas nun unu el la ŝatataj programeroj de la aŭskultantaro. Kiam la elstaraj hindaj dancistoj S-ro Uday Shankar kaj Lakshman fratinoj vizitis Ĉinion, iliaj prezentaĵoj

Ĉinaj dancistinoj laŭdas Radha lakshman



fariĝis niaj artaj festotagoj. Multaj rigardantoj laŭdis ke tian perfektan dancon ili malofte vidis en la pasinteco.

La hindaj kinobildoj jam atingis ĉiujn angulojn de nia lando. Rigardi hindajn filmojn jam estas nia komuna inklinio. La bonegaj filmoj kiel "Do Bigha Zamin (Du Akroj da Tero)", "Avara (La Vagabondo)" kaj la lastatempe prezentata "Ĝhansi Ki Rani (La Reĝino de Ĝansi)" pliigis la komprenon kaj amikecon inter niaj du popoloj. En la pasinta jaro la Junulara Arta Teatro en Pekino ludis la klasikan dramon "Sakuntala" verkitan de la granda hinda poeto Kalidaso. Miloj kaj miloj da ĉinaj rigardantoj admiregis tiun senmortan ĉefverkon.

Ĉinaj verkistoj kaj poetoj kiuj revenis post siaj vizitoj al Hindio skribis multajn belajn poemojn, prozojn kaj raportojn pri siaj neforgeseblaj impresoj pri tiu lando.

"Hindio, Ni Neniam Vin Forgesos!", libro de vojaĝimpresoj pri Hindio verkita de Yan Wen-jing por la infanoj, estas unu el la eminentaj literaturaj verkoj. Per simpla, viveca kaj bela lingvo la verkisto elpentris tiel fidele kaj kortuŝe la de li viditan Hindion. Dank' al lia bela kaj konciza priskribo kaj fidindaj materialoj ĝi pliigis mian karmemoron pri la bela Hindio.

Kiam ajn mi rememoras Hindion, tuj al mi ŝajnas ke mi vidas la en lago speguliĝantan ĉielon kun vagantaj blankaj nuboj kaj la foliricajn branĉojn de la surbordaj arboj, tiel klaraj kaj freŝaj. Kiam ajn mi fermis miajn okulojn, ŝajnis al mi ke mi vidas la bolidojn sur la hinda ĉielo kaj la flamojn en la koroj de la hinda popolo. Paco kaj amikeco estas niaj virtoj hereditaj de la prapatroj. Nur post malfacilega lukto per sango kaj ŝvito ambaŭ niaj popoloj sukcesis fondi la hodiaŭajn liberajn kaj memstarajn landojn.

Antaŭe Hindio estis nomata de la imperialistoj "Gemo sur la Viktoria Krono". Hodiaŭ tiu mirinda gemo estas jam tenata en la propraj manoj de la hindoj. Kiel ĝoja ni estas vidante ke apud ni troviĝas nun granda, stariĝinta najbaro kun senlima memfido kaj forto por paco — Hindio.

Ekrememoriginte la amikecon inter ni, en mia koro tuj eksonas kanto de senfine ondiĝanta homamasego. Tiu kanto plena je memfido kaj ĝojo transflugas Himalaja-montaron kaj interplektiĝas en potencon voĉon, "Hindi Ĉini Bhai Bhai!"

Ni kantadu tiel arde kaj sincere generacion post generacio por ĉiam seninterrompe!

Trad. Pandiŝo

Foto de Chi Lien-po

Lando de Poezio

— Pri moro de Bai-nacio en Eryuan-gubernio —

VENANTE al vilaĝo de Bai-nacio en Xishan-distrikto de Eryuan-gubernio, mi kvazaŭ iris en landon de poezio.

Ĉiuvespere, kiam krepusko senbrue vualis la vilaĝon, la vilaĝanoj kolektiĝas ĉirkaŭ brila fajro kaj ekkantas. La kantoj kaj ridoj forlavas la lacon de la tago, kaj kondukas la homojn en mondon de amo kaj revoj. La kantado ofte iras en konkuro inter paro de gejunuloj, kaj la aliaj apude akompanas la paron; sed impulsate de sia emocio ili ofte intermetas kelkajn frazojn al la konkura kantado kaj tiel ĝin partoprenas. Se renkontiĝas egale bonaj gekantantoj, tiam la kantado, kiel fluo de rivereto, daŭras nehaltigeble, ofte ĝis la elkrepuskiĝo en la oriento.

En aliaj regionoj, oni ne povas kanti antaŭ siaj gepatroj kaj superuloj, sed en Xishan-distrikto ĝuste male. Kiam la filo aŭ filino konkure kantas kontraŭ alia, la gepatroj sidas proksime apud li aŭ ŝi. Se la filino ne scipovas respondi, tiam la patrino sufloras al ŝi kelkajn vortojn; se la filino erare respondis kaj estas priridata, ankaŭ la patrino honte ruĝiĝas kaj sentas sin malhonorata. Simile la patro sin lokas proksime al sia filo, kaj same prizorgas lian konkuron. Se iu junulino ne kuraĝas akcepti provokon, tiam ŝia patrino laŭte diras: “Finjo, ne timu, kantu ĉiujn kantojn kiujn panjo instruis al vi.”

Laŭ la tiea moro, la gepatroj devas instrui al siaj gefiloj multe da arioj. Se la gefiloj povas kanti bone kaj memori multe da arioj, tio signifas, ke la gepatroj faris bonan edukon, kaj la gepatroj ricevas laŭdojn de la publiko. La tieaj infanoj lernas paroli kaj kanti ariojn preskaŭ samtempe. Senpaciencaj gepatroj ofte komencas instrui al siaj gefiloj ariojn, kiam la infanoj ankoraŭ ne scipovas paroli. Iu knabineto jam povas parkere kanti pli ol ducent ariojn, kvankam ŝi ankoraŭ ne povas paroli klare. Tio povas esti rigardata kiel ia unika edukado. Per belaj arioj la gepatroj ekkonigas al siaj gefiloj la mondon kaj vivon, kaj semas belajn semojn spiritajn en iliajn purajn animojn.

Junuloj ofte estas hontigataj, se ili ne povas parkeri multajn ariojn. Iutempe, kun laŭtaj ridoj aro da junulinoj sieĝas kelkajn junulojn manon en mano kaj postulas al la sieĝatoj konkure kanti kun ili. Se la junuloj ne povas kanti responde, la junulinoj svarme sin ĵetas sur la sie-

ĝatojn kaj ilin ŝerce batas, ke la junuloj ruĝiĝas kiel porka hepato pro honto. Fakte la arioj fariĝis ilia dua lingvo, la ĉefa komunikilo de amo por la gejunuloj.

Dum la alta tajdo de la kooperiĝo, la kamparanoj de Xishan-distrikto ĉie okazigis festajn kunvenojn informiĝinte pri la sankciiĝo de siaj kooperativoj. Post vesperiĝo svarmis homamasoj surmonte kaj surkampe. Ĉirkaŭante lamplumojn ili jubile kantadis, kaj improvizis multajn kantojn laŭdantajn la novan vivon. La kantado daŭris ĝis la tagiĝo. Kaj tia kantado kaj dancado daŭris kelkajn tagojn.

En Xishan-distrikto estas ankaŭ speco de eposa ario nomita “danc-kanto.” La plej kara el la “danc-kantoj” rakontas pri la genezo de Bai-nacio: En la pratempo ne ekzistis la ĉielo, nek la tero, la tuta universo estis senlima maro, en kiu floris orkolora tamburo. Poste, sankta birdo bekmalfermis la oran tamburon, el kiu elsaltis viro kaj virino, kaj ili estas la prapatroj de la homaro. Tiu paro naskis gefilojn kaj generis la homaron. La diversaj nacioj originale estis gefratoj, sed poste pro diversaj kaŭzoj formiĝis la hodiaŭaj malsamaj nacioj. Krome, la kanto rakontas ankoraŭ pri la deveno de diversaj objektoj. . . Tiuj rakontoj tute diferencas de tiuj de aliaj nacioj. Ekzistas tie ankaŭ multaj “danc-kantoj” de popolrakontoj.

Bat-kantoj plej ofte prezentiĝas okaze de geedziĝo aŭ funebro. Sur placo, homoj formas rondon, kaj ĉiu tenante pelveton da vino, kantas kaj rondiras malrapide per simplaj danc-paŝoj. La kantado iras en formo de demandoj kaj respondoj. Ekzemple, se oni demandas: “Kion ni prenu kiel plumon?” La ceteraj povas kante respondi: “La radiojn de la suno.” Demando: “Kion ni prenu kiel paperon?” Respondo: “La vastan teron kiel paperon.” La metrikaj reguloj de la “danc-kantoj” ne estas tiel severaj.

La arioj de Xishan-distrikto estas riĉaj, nombrante kelkdek mil. La loĝantoj de Xishan-distrikto ofte diras: “La akvo de Suijiang-rivero estas neelĉerpebla; la arioj de Xishan-distrikto estas ne finkanteblaj.” Tre interesa legendo klarigas, kial la arioj de Xishan-distrikto estas tiel multaj: En la pratempo la homaro ne scipovis kanti ariojn, tial de la ĉielo venis dio portante



(Daŭrigo sur P. 28)

Kuriozaj Birdoj kaj Bestoj

en la Altaĵa Montregiono

EN la Altaĵa Montregiono de Xinjiang-Uĝura Aŭtonoma Regiono, arbaroj, stepoj, larĝaj riveroj kaj grandaj lagoj estas la lokoj kie ŝatas resti kaj generi birdoj. Tie troviĝas diversspecaj belvoĉaj orioletoj kaj hirundoj; flugaroj de ostardoj kaj sovaĝaj anasoj; kruelaj leporfalkoj kaj vulpofalkoj, kiujn la ĥazakaj ĉasistoj ŝatas bredi; kaj fiŝfalkoj, fiŝlupoj kaj mevoj, kiuj kaptas la akvajn tribojn el riveroj kaj lagoj. Sed la plej kurioza estas la cignoj neĝblankaj kaj saĝbirdoj kiuj sciopovas teksti neston el haroj per sia beko.


Saĝbirdo, kiu troviĝas ekskluzive en la Altaĵa Montregiono, havas nur duonan grandecon de pasero, kun grizruĝaj plumoj kaj bela voĉo. Ĉiujprintempe ili alflugas de kie ne scias eĉ la ĥazakoj tie loĝantaj de generacio al generacio. Ili flugas en paro al la bordoj de Qing-rivero aŭ Ulungurivero por trovi kaŝitajn lokojn por fari nestojn sur branĉoj etendiĝantaj al rivermezo aŭ negrimpeblaj por homoj kaj bestoj. Unue ili alportas iom da vostonoj kaj kolharoj de ĉevaloj, kiujn ili alligas

beke al la branĉoj kiel varpojn, kaj poste ili alportas lanon, ŝaflanugon kaj kamellanugon kiel veftojn, kaj zorgeme teksas neston sur la branĉoj.

Postnelonge, jam pretiĝas lanuga nesto de saĝbirdo en grandeco de manplato pendanta sur branĉo, kun aperturo tiel malgranda kiel kovrilo de inkujo. Kiam malvarmiĝas en aŭtuno, la gepatroj forflugas kun siaj idoj, kaj revenas en la sekvanta printempo.

Oni diras ke en la nestoj de saĝbirdoj ekzistas birda ekskremento, per kiu oni povas kuraci artritton. Tian neston oni povas ŝmiri kiel unĝventon al la dolora parto por kuraci la malsanon. Laŭplane en la pasinta jaro la kooperativoj de la Altaĵa Montregiono aĉetis 3.000 saĝbirdajn nestojn por la Ĉina Medikamenta Kompanio.


Kiom da specoj de kuriozaj bestoj ekzistas en la Altaĵa Montregiono oni ankoraŭ ne scias nun, la jam konataj estas ĉamo, diversaj cervoj, ha-urso granda kiel bovo, kaj lun-urso, sur kies nigrabrunda dorso troviĝas krescento.



Senvelkaj

Jen floroj el papero, papirifero, silkajo, drato k.a. ordinaraĵoj, konkurantaj kun la naturaj en beleco kaj superantaj ilin en senvelkeco.

En malnova Ĉinio la artefaritaj floroj



Pri la lunurso estas legendo inter la tieaj ĥazakaj kaj mongolaj paŝtisoj. Oni diras, ke la krescento sur la dorso de lunurso povas ŝanĝiĝi laŭ la lunfazo. Kvankam tio ĉi estas legendo ne konforma al la fakto, tamen aŭskultante la rakonton oni sentas ke ĝi estas tiel verŝajna kaj alloga.

Ĉi tie produktiĝas ankaŭ lutro, foino, neĝbala-ulo, diversaj vulpoj, ter-musteloj, nigroŝafoj k.c. Ĉi tie produktiĝas griza sciuro, ermeno, makula mustelo, flava mustelo, sciuro, putoro kaj flugsciuro kiu havas flugilojn kaj povas flugi. La altvalorajn felojn de ĉi tiuj bestoj la ŝtato grandkvante aĉetas ĉiujare. La diversrangaj kompanioj de la Altaja Montregiono aĉetis pli ol 34,000 pecojn en 1956.

La Altaja Montregiono estas fame konata ankaŭ pro la riĉa produkto de freŝaj bongustaj fiŝoj. La plej produktivaj lokoj estas Bulunto-maro etendiĝanta je pli ol 700 kvadrataj kilometroj, kaj la longa Ulungu-rivero. En ĉiu majo, kiam la kamparanoj akvumas la kampojn estas ĝuste fiŝsezono. Svarmoj da fiŝoj rekte naĝas en la irigaciajn kanaletojn, kaj estas pelitaj de la fluo sur la kampojn. En la kampanguloj, proksimaj al la enfluejo ofte amasiĝas pli ol futon dika tavolo da fiŝoj.

Vintro estas fiŝkapta sezono en la Altaja Montregiono. Ĉiujare granda kvanto da frostigitaj fiŝoj estas transportita de tie al Klamai, Ulumuĉi kaj aliaj industriaj centroj.

Trad. Liu Ling



Flugsciuro

Floroj

estis uzataj ĉefe kiel ornamadoj por knabinoj kaj virinoj. Post la liberigo, la florfaristoj faris ilin taŭgaj ankaŭ por dekoracii salonojn, kunvenejojn kaj loĝejojn.



TRI POEMOJ DE LA LASTA GENERACIO

Lummaro

Guo Mo-ro

La universo senlima
Fariĝis mar' de lumo.
Ĉie lumondo de la vivo,
Kaj ĉie estas freŝa junco,
Ĉie estas poezio,
Ĉie estas rid' en kuno:
Ridas la maro,
Ridas la monto,
Ridas la tero,
Ridas la suno,
Mi kaj A-ho, mia eta ido,
Ridas kune en la Rido.

La verdaj pinoj kvazaŭ el smeraldo,
Ridante, per mansigno vokas nin,
Kaj la ebena de arĝenta sablo,
Ridante, al brakumo logas nin.
Tien ĉi ni venas,
Venu ankaŭ la brakumo.
Sur via brusto ni deziras
Nin bani en la lumo.
Amas' da lernejoj knabetoj
Petolas kun salt' kapreola;
Jen unu aljetas plenmanon da sablo,
Respondas alia per rido sonora;
Jen unu renversas alian kubute,
Tuj lin mem faligas ekbato surkola:
Revenas mi al la malnova tempo karmemora.

Malnova tempo antaŭ dekkvin jaroj.
Mi estis tiam nur infan',
Mi vivis sur Chingyijiang, en Jiazhou,
Kaj lernis en lernejo apud Ziloshan.
Mia patrin-lernejo apudmonta!
Tiu sablej' en via sin', mia lulilo,

Ĉu ankoraŭ tiel plenas de glori-brilo?
Iam mi havis tre amatan kamaradon,
Kiu mortis en ĉi jar' laŭ onidiro.
Mia intima kor-amiko,
Via figur' gracia kiel junko kaj saliko
Ankoraŭ ŝvebas antaŭ mia kor-okulo,
Ĉu ankaŭ la anim' liberigita
Apud mi ĝoje ridas en la or-nebulo?
Kaj dum spirito disiĝis de l' korpo,
Ekmemorante pri via amiko transmara
Kiom vi verŝis da larmoj amaraj?

Ha, tie svelta lumotur' el ŝtono
La maron jam prilumas.
A-ho deziras ĝin surgrimpi,
Tuj lian volon mi plenumas.
Ha, montoj kvazaŭ brulas,
Arĝentaj ondoj sin rulas
Kaj la velŝipoj opaj
Kvazaŭ en la spegulo kuras,
En la spegulo ankaŭ blankaj nuboj kuras kune:
Jen la portreto de la vivo, ĉu ne?

A-ho, kie estas la ĉielo?
Li montras al la superkapa bluo.
A-ho, kie estas nia tero?
Li montras al insuloj en marfluo.
Kie estas paĉjo?
Li montras al fluganta birdo en aero.
Hejho, mi estas birdo en aero.
Mi estas birdo en aero.
Kun blankaj nuboj mi vetflugos,
Kun helaj veloj mi vetkuros:
Rigardu, kiu el ni alte flugos?
Kaj kiu el ni pli rapide kuros?

Maristo

Liu Yen-ling

Luno sur la ĉielo,
Kaj ŝipo sur la mar'
Li sidas en mallumo apud direktilo
Kaj la vizaĝon kovras per manpar'.
Li timas, ke la luna palpebrumo
Kaj la ŝvelo de ondar'
La rigardon logus al la hejmolando
Ĉe l' tuŝiĝo de ĉiel' kaj mar'.
Sed ekvizias antaŭ li:
Apud la puto, kie granatarbo floras en ruĝklar',
La karulin' starigas bambustangojn
Por sekigi sian bluan veston el perkal'.

Sablero

Zang Ke-jia

Kiel sablero vi vagflugas laŭ ventporto,
Mem ne sciante kien vi veturos for;
Forgesu, ke al vi ankoraŭ restas forto,
Kaj ne parolu pri la celo en la kor'.

Ekde tagiĝo vi veturas laŭ ventpelo
Ĝis nigran ombron ĵetas ĉie la vesper'.
Nun surĉiele nevideblas sola stelo,
Vi povas ripozeti kroĉe al herber'.

Tradukis S. J. Zee

DU POEMOJ DE DU FU

Du Fu (712-770 p.K.) estas unu el la plej grandaj realismaj majstroj de la klasika poezio de Ĉinio. Li vivis dum la periodo, kiam la riĉa kaj potenca imperio de Tang-dinastio komencis malprosperiĝi pro militado. Kvankam li okupiĝis kelktempe kiel malatranga kortegano, tamen li ĉiam tenis intiman interrilaton kun la vasta popolo. Precipe post la ekribelo de An Lu-shan en la jaro 755, kiam li vagadis kaj suferadis kune kun la popolamasoj, pliintimiĝis lia rilato kun la popolo.



Pedelo de Ŝaŭ-vilaĝo

Vespere Ŝaŭ-vilaĝon mi alvenis.
Je nokt' pedel' konskriptojn kapti penis.
Trans muron fuĝis l' aĝa mastr' el korto,
Kaj l' mastrin' trempaŝis al la pordo.

Ho, kiel muĝis la pedel' kolera!
Ho, kiel ploris la avin' mizera!
Aŭdiĝis de l' avin' jen plendrakonto:
"Tri filoj miaj jam ĉe Jeĉeng-fronto.

De unu oni al mi vortojn portis:
L' aliaj du ĵus en batalo mortis.
Ankoraŭ vivu l' postvivantoj nune,
Sed kiuj mortis, ho, jam vivos plu ne!

En nia domo jam neniu estas
Krom mia nep' mamsuĉa ĉe la sino,
Kaj ankaŭ l' bofilino pro li restas,
Sed por irad' nur per ĉifon' sin vestas.

Mi kvankam aĝa kaj sen forta mano,
Volontas kun vi en ĉi nokt' reiri
Por urĝa fronta servo ĉe Hojan-o,
Ja maten-manĝon povos mi kuiri. "

Malfruis nokt', kaj l' voĉoj jam silentis,
Sed singultado kvazaŭ plu ĝemplendis.
Matene, kiam vojon mi ekiris,
Mi adiaŭon nur al l' avo diris.


Kanto pri la Detruo de la Kabano en Aŭtun-uragano

Septembre hurladis aŭtun-uragano,
Forlekis pajltegon de mia kabano.
Kaj l' pajlo disfalis transborden ĉe l' valo:
La alia kroĉiĝis ĉe l' supro arbara;
Marĉfundon celiĝis de l' suba la falo.
Bubaro el sudo ekrabis libere,
Eĉ spit' al ĉeesto de l' mastro-aĝulo,
Kun pajl' bambuaren forkuris kruele.
Mi kriis, kriadis — rezulto — gorĝ-brulo.
Bastone hejmiris, mi vane ĝemspiris.

La vento mutiĝis, fulgnuboj aperis,
L' aŭtuna ĉielo baldaŭe vesperis.
Multjara litkovro jam feron similis,
Kaj filĉjo kuŝaĉis, la enon disŝiris.
Endome sur liton pluvakvo gutadis,
Jam sekis nenie, plu forte pluvadis.
Malmulte mi dormas de post la ribelo,
Longnokta malseko — kiam venos taghelo!

Kiele fariĝu milĉambra domego
Kaj monte ĝi staru en vento-pluvegoj,
Ke ene ĝojvivu tutmondaj mizeraĵ kolegoj?
Ho! se iam aperos antaŭ mi altega ĉi domo,
Eĉ en la kaban' detruita mi mortos de frosto feliĉa
homo!

Elĉinigis LAŬLUM



Mao Zung-huag:

KABANO DE DU FU

JE mateno somermeza ni vizitis Kabanon de Du Fu ĉe la bordo de la Florlava Rivereto, en la sudokcidento de Chengdu.

La vojo sin etendas en ombraj arbaroj, la aero aromas de la florantaj rizplantoj en la ĉirkaŭe etendiĝanta vasta kamparo. La murmuro de riverfluo kaj la ĉirpado de cikadoj faras tuŝantan simfonion. Rigardante trans teran muron, ni vidis, ke cielskrapas smeraldaj arboj grandaĝaj, kaj en la profundo de la arbaro vidiĝas laŭbosuproj kaj tegmentanguloj. Jen estas la loko kie iam loĝis Du Fu, nia granda poeto de Tang-dinastio (618-907 p.k.). La Kabano "okcidente de l' Milmejla Ponto, kaj en nordo de l' Centflora Lago", rilatiĝinte kun la nomo de Du Fu pli ol mil jaroj, jam fariĝis sanktejo de la historio de ĉina literaturo.

Ni enpaŝis la kortopordon. Jen etendiĝas antaŭ ni sceno pentrinda. Ĝuste en tiu ĉi loko la poeto loĝis tri jarojn kaj ok monatojn kaj verkis cent kvindek senmortajn poemojn.

Ni paŝis antaŭen laŭ la aleo inter floroj kaj arboj, renkontante kvazaŭnavede irantajn vizitantojn. La okulfrapa freŝeco de la ruĝaj balustradoj kaj skulptitaj fenestroj de vicoj da domoj atestas bonan prizorgon. Trapasinte la Halon de Poezi-historio kaj transirinte arkan ŝtonponteton ni venis en la Memorigan Halon al Du Fu. Meze de la halo prezentiĝas, krom knedita statuo de la poeto, ankaŭ lia figuro gravurita en ŝtono, kiu jam difektiĝis kaj malklariĝis pro neglekto en la pasinteco. Starante antaŭ la statuo de Du Fu, mi ekmemoris liajn senmortajn versojn:

*"En ruĝaj pordegoj putriĝas kaj vin' kaj viando,
Dum malsatmortadas povruloj ĉe la vojoorando."*

La versparo ambaŭflanke de pordo skribita de Maljunulo Ding-tang trafe prezentas nian poeton:

*"Malsanojn de l' soci' prifilozofas lia poezi',
Suferoj de l' popol' ondegas sub lia plum' en
bol'."*

Por memorigi la grandan poeton, du ekspozicioj pri liaj vivo kaj verkado kaj de pentraĵoj laŭ la enhavo de liaj poemoj estas aranĝitaj en du nove

konstruitaj salonoj. Elirinte el la Memoriga Halo, ni turniĝis maldekstren kaj eniris la unuan ekspoziciejon. Tiu ĉi ekspozicio dividiĝas en du partoj: La unua konsistas el memorigaj objektoj, originalaj skribaĵoj, fotoj, preskopioj de ŝtongravuraĵoj k. a., inter kiuj troviĝas poemoj de Du Fu manskribitaj de Su Shi (fama poeto en Sung-dinastio, 960-1279) kaj Shi Ke-fa (nacia heroo de Ming-dinastio, 1368-1644). Tie ekspoziciigis ankaŭ fotoj pri la lokoj vizititaj de la poeto, per kiuj ni informiĝis, ke li vizitis la provincojn Honan, Jiangsu, Ŝanxi, Sichuan, Hunan k. a. Dum siaj lastaj jaroj, li vagis al Xiang-rivero, kie li suferadis de malsato kaj malsano sin vivtenante per sovaĝ-legomoj, kaj finfine mortis en boato sur la supra parto de la rivero. La dua parto konsistas el libroj: diversaj mankopiitaj kaj presitaj poemaroj de Du Fu kaj iliaj pristudoj dum pli ol sepcent jaroj ekde Sung-dinastio, kaj tradukaĵoj de liaj verkoj en la angla, rusa, franca, germana, japana, korea k. a. lingvoj. Kontraŭ la unua ekspoziciejo troviĝas la ekspoziciejo de pentraĵoj verkitaj laŭ la poemoj de Du Fu de nuntempaj famaj pentristoj kiel Qi Bai-shi, Chen Ban-ding, Ke Huang k. a.

Oni diras, ke Du Fu rifuĝis al Chengdu en la vintro de la jaro 759 p. K. En la komenco, li loĝis en monaĥejo proksime de la Florlava Rivereto, kaj nelonge poste trovinte peceton da dezerta tero li konstruis kabanon sub granda nanmu-arbo, kiuj ambaŭ jam ne ekzistas.

La trajtoj de la ĝardeno de Kabano de Du Fu jam tute ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj dank' al zorga riparado kaj konstruado. Ruĝas lotusfloroj en verda lageto, ombraj pagodoj fora la florageojn, trilas kantoj kaj sonoraj ridoj en la profundo de bambuaroj — ĉio ĉi tio estas tiel ĉarma ke la vizitantoj ilin admirante ofte forgesas hejmeniri. Tie troviĝas ankaŭ aroj da nanmu-arboj, prunarboj, kamforarboj, kaj multaj salikoj, cipresoj, laŭrarboj. La altaj kaj rektaj nanmu-arboj pliiĝas la majestecon

(Daŭrigo sur P. 15)

LA KAJTO

Ilustrita de A Lao

JUS degelis la lasta neĝo printempa sur la verdiĝanta flava herbejo, kaj la akra vento jus komencis mildiĝi, kiam la unuaj kajtoj jam aperis sur la ĉielo.

Dum mia infanaĝo, aŭtuno estis por ni sezono de grilluktigo; printempe ni nin amuzis preskaŭ ekskluzive per kajtoj.

Antaŭ la okjara aĝo, mi neniam ludis kajton memstare, ĉar panjo timis, ke mi rompos al mi la krurojn surmonte, tial ŝi ne aĉetis kajton por mi, kaj nur lasis min ludi kajton kun la najbara fraĉjo Gui-sung, agante kiel lia helpanto.

██

KURANTAJ AFEROJ

██

PLI OL 40 NOVAJ FILMOJ EN 1958

En la kuranta jaro la ĉina popolo ĝuos pli ol 40 novajn filmojn enlande produktitajn. Inter ili troviĝas filmoj pri revoluciaj bataloj, la vivo de la gejunuloj, la kreskado de la agrikultura produktado, kaj fortikiĝo de la junuloj en la kamparo. Ankaŭ estas du filmoj temantaj pri la vivo de ĉinaj minoritatoj. Art-registraj filmoj pri ĉinaj operoj, kiujn plej ŝatas la popolamaso, produktiĝos en sufiĉe granda kvanto. La plej interesa filmo eble estas "La Kajto" produktita en kunlaboro de ĉinaj kaj francaj geknaboj.

Krome pli multiĝos ankaŭ filmoj eksterlandaj kun adaptitaj ĉinaj paroloj. Ili nombras pli ol cent. Troviĝas inter ili filmoj produktitaj en Sovetio, Ĉeĥoslovakio, Hungarlando, Germanio-DDR, Bulgario, Koreo, Rumanio, Francujo, Britujo, Hindio, Japanio, Meksiko, Hispanujo, Grekujo, Aŭstralio kaj Aŭstrio.

tuj malfermi la manojn, ke li impetu antaŭen tirante la kajton. Ju pli rapide li kuris, des pli alten la kajto povis flugi. Ofte kiam li haltis ĉe la fino de la monteto post 30-40-futa kurado, la kajto jam flugis en la ĉielon kaj tie "firme staris". Tiam ĝojkriante mi alkuris al li, kaj fraĉjo Gui-sung lasis al mi momente teni la bambubastoneton per kiu oni volvis la fadenon. Pezeca estis la bambubastoneto, ĝin tenante en la mano mi sentis, kvazaŭ mi tenus karan blankan sovaĝkolombon, kiu povus forflugi pro grajno da malatento. Frotante la piedojn unu kontraŭ la alia (li estis nudpieda tutjare), li atentigadis min kontente rigardante al sia kajto: "Tenu firme! Tenu firme!" Kiam ventegis, mi devis des pli bone koncentrigi miajn energiojn por firme teni la bambubastoneton, eĉ kun koro maltrankvile batanta — kaj tiumomente mi eksentis la veran plezuron en kajtludo.

En la jaro kiam mi estis 9-jara, panjo aĉetis por mi la unuan kajton; ŝi ankoraŭ volis ke mi ĝin ludu kune kun fraĉjo Gui-sung. Kaj alte tenante kajton kune kun miaj samaĝuloj, mi trairis la vilaĝon. Vidante ke iuj infanoj enmetas siajn fingrojn en la buŝon pro admiro, kaj aliaj prenas kiel kajton pecon da paperaĉo ligita al ŝnuro, mi sentis mian koron plena de fiero. Mi kuregis sur la malebena monteto, propramane ĉielen sendis la kajton kaj imitante fraĉjon Gui-sung mi ennajlis la bambuan volvilon en la teron, kuŝiĝis apude kaj senzorge maĉadis okzalon, aŭ fajfis baladan melodion per foli-fajfilo. Kelkfoje, fraĉjo Gui-sung eĉ kuraĝis fari tian riskajon: intence forlasi la bambuvolvilon, ke la kajto forŝvebu kvazaŭ kun fadeno rompita kaj la bambuvolvilo forsaltu surtere kiel leporo, kaj nur kiam ĝi jam





KURANTAJ AFEROJ

Memoro al Bulgara Poeto P.K. Yavorov

Ĉijare estas la 80-a datreveno de la naskiĝo de la fama bulgara poeto P. K. Yavorov. En januaro la Ĉina Verkista Asocio kaj la Pekina Biblioteko kune aranĝis celebran kunvenon por tiu ĉi poeto. Ĝin ĉeestis pli ol 60 ĉinaj poetoj, verkistoj kaj junaj literaturamantoj. K-do Zang Ke-jia, poeto kaj sekretario de la Ĉina Verkista Asocio, kaj K-do Guo Bao-quan, ĉina verkisto, ambaŭ faris raporton pri tiu ĉi poeto kaj la signifo de liaj verkoj. Ankaŭ la bulgara ambasadoro A. Nedialkov partoprenis tiun ĉi kunvenon kaj parolis pri neceso de kultura interfluo inter Ĉinio kaj Bulgario.

ĉielon kun nebridebla pasio. Li diris, ke la skolopendro-drako apartenas al la familio Wang en la vilaĝo Jinlaowang, kaj ĝi konsistas el serio de 16 kajtoj, ĉiu el ili kun diametro de barelego. Por ludi tiun kajton du plenkreskuloj estas necesaj por firmteni la ŝnuron, kaj se ni ĝin flugigus, almenaŭ 5 personoj estus bezonataj por tio. — Kaj ĉiuj ni kredis al tio, ĉar ĝuste por la familio Wang en Jinlaowang-vilaĝo laboris la onklo de fraĉjo Gui-sung kiel jara dungito.

La kapon returninte ni ekrigardis al niaj propraj vestodrakoj, ho, ili ja estis ne kajtoj, sed nur paperpecetoj, teneblaj eĉ per du etfingroj.

Kompreneble ekposedi skolopendro-drakon ni neniel kuraĝis ambicii (escepte en sonĝo!), tamen ni ja deziris ekhavi grandan papili-drakon kun molaj flugiloj, diverskoloraj desegnoj sur la tuta korpo, du ruliĝantaj okuloj, kaj al kiu oni ankaŭ povas instali fajfilon, por ke ĝi fariĝu granda papilio zumanta. Sed ankaŭ tio estis tiam tro alta aspiro por ni, ĉar por fari papili-drakon bezoniĝis ne malmulte da bambusplitaĵo kaj persikflora papero, kaj krome oni bezonis ankaŭ grandan bobenon da linsnureto por ĝin flugigi.

Tion do mi nur prirevis. Sed efektivaĵajn paŝojn ekfaris fraĉjo Gui-sung: preskaŭ ĉiujn arbo-kronojn en la vilaĝo li surgrimpis por forpreni ovojn el birdonestoj. Tiam ankoraŭ vivis birdobredisto Avo Zhi-xi, kiu volonte aĉetis diversajn birdovojn po unu aŭ du kupraj moneroj depende de tio ĉu viaj estas ovoj de pasero aŭ kanario. Iutage, fraĉjo Gui-sung trovis, en morusarbaro, du longajn ovojn smeraldajn. Post esploro, Avo Zhi-xi konstatis, ke ili estas turdovoj, kaj ilin

forsaltis sufiĉe fore, kun ekkrio ĝin postkuri kaj kapti.—Sed tiam mi ankoraŭ ne kuraĝis fari tian riskaĵon.

Sur la serena ĉielo printempa troviĝis kajtoj de diversaj specoj, de la kvadrataj “tegol-drakoj” ĝis la pompaj “aglo-drakoj” kaj “papili-drakoj”, flosantaj alte kaj malalte, fore kaj proksime en la aero. La kajto, kiun mi tiam flugigis, estis “vesto-drako”, granda nur kiel duonfolio de jurnalo kaj ambaŭflanke kun ruĝa ideografo “feliĉo” presita. Tia kajto estis plej ordinara, plej simpla kaj aĉetebla el butiketoj per nur 3 kupraj moneroj. La plejparto de miaj samaĝaj kamaradoj preskaŭ ĉiuj ludis per tiaj kajtoj, inter kiuj la sola diferenco estis la malsameco de la ornamoj sur la vosto: iuj kun pendantaj mallarĝaj paper-rubandoj, aliaj kun ĉeno da diverskoloraj paper-ringoj algluitaj. La pompajn kajtojn ni povis nur longe rigardadi kun envio, admiradi, preparoli kaj aplaŭdadi.

Sed vera spektaklo estis la skolopendro-drako super Jinjiaqiao-vilaĝo trans-rivera. Ĉiam kiam ĝi leviĝis alten en la ĉielon, ĉiuj aliaj kajtoj tuj perdis sian brilan koloron, kaj fariĝis tiel sen-signifaj kiel paseroj antaŭ la fenikso. La skolopendro-drako ŝvebadis plej alte en la ĉielo, tiel gracia kaj fortika kiel drako naĝanta; kaj ĝi aŭdigis zumegon, kio des pli fortigis ĝian imponecon.

Tiu, kiu plej raviĝis de la skolopendro-drako, estis fraĉjo Gui-sung. Ĉiam sidante surgenu kaj kun larĝe malfermita buŝo li rigardadis en la

aĉetis per 15 kupraj moneroj. Sekve de tio, fraĉjo Gui-sung tuj aĉetis ĉian materialon bezonatan.

Tuttage li sin kaŝadis en la subtegmento, tranĉadis, rabotadis, kunligadis, gluigadis, ŝvito gutadis de lia lentugoplana vizaĝo malsekigante la maldikan persikfloran paperon. Mi ofte lin vizitis, kaj vidante lin malfacile kliniĝanta al la tablo plenplena de bambuaj ringoj, bambuaj framoj kaj persikflora papero, kaj absorbite laboranta kun paŭtanta buŝo, mi ĉiam sentis estimon kaj kompaton al li. Mi pensis: tre granda entrepreno estas fari papili-drakon, eĉ pli malfacila ol elpreni 20 turdovojn el nestoj.

Laŭeble mi helpadis al fraĉjo Gui-sung ion fari. Dum la farado de la framoj, mi helpis al li tenadi la bambuajn kadrojn, fari nodojn — alie li devus fari nodojn per siaj dentoj, kaj lia frontdentaro ja estis nekompleta. “Kiam la papili-drako pretiĝos.” fraĉjo Gui-sung diris, “ĝi apartenos al ni ambaŭ. Al la aliaj mi ne lasos eĉ ĝin ektuŝi.”

Tri plenajn tagojn ni laboregis, kaj por instali la du okulojn ni devis peti alies helpon. Finfine, impona papili-drako elfariĝis. Kiam finfine la gluaĵo sur ĝi sekiĝis tre malfacile post nia senĉesa blovado sur ĝin, fraĉjo Gui-sung ĝin levis, kaj akompanate de mi iris sur la monteton por prove ĝin flugigi.

Ni intence eliris ĝin provi kiam ne ĉeestis aliaj. Kaj kiel atendite, apenaŭ dek futojn leviĝis la papili-drako, kiam ĝi transkapiĝis kaj malsupren ĵetiĝis. Mi vekriis malespere; tamen fraĉjo Gui-sung neniom konsterniĝis, li aplombe aldonis peceton da papero sur ĝia dekstra flanko. La kajto leviĝis denove. Ĉifoje ŝi transkapiĝis dekstren, kaj fraĉjo Gui-sung aldonis balaston al la maldekstra parto de ĝia vosto. Poste la kajto ne plu transkapiĝis, sed malsupren “sidiĝadis”. Tio estis pro tio, ke la ŝnur-triopo ne estis ĝuste alligita, kaj post ĝia reĝustigo, la kajto jam fariĝis tre stabila.

Fraĉjo Gui-sung rapide malvolvis la tutan longon de la linŝnureto. Balanciĝante nia papili-drako ĉiam pli supreniĝis, elegante pozante en la vento ĝi aŭdigis zumadon. Tenante la bambubastonon, mi sentis ĝin tre peza, ke mi eĉ povus faleti pro ĝia tiro, se mi ne estus singardema. Fraĉjo Gui-sung tiel ĝojiĝis, ke li freneze transkapiĝadis apude.

Sed, kiel ofte okazis al ni, apenaŭ “firmstariĝis” la kajto, kiam kelkaj maldensaj akveroj malsupren venis el la griza ĉielo — printempa pluvo. Fraĉjo Gui-sung saltleviĝis, transprenis la bambubastonon, kaj komencis “urĝe retiri” en sia speciala rapideco. Susur! susur! tiel rapide turniĝadis liaj pojnoj kvazaŭ en boksado, pli kaj pli ŝveliĝis la ŝnurvolvajo kaj pli kaj pli malalten tiriĝis la kajto; kiam intensiĝis la printempa pluvo, ni jam retiris la kajton kaj rifuĝis hejmen.

Ni decidis publike flugigi nian novan kajton en la sekvanta antaŭtagmezo.

La sekvantan tagon estis tre serene, en la ĉielo floris diversaj kajtoj — jen estas bona ŝanco por nia papili-drako montri sian eminentecon. Foje kaj refoje mi kuris sub la subtegmento de fraĉjo Gui-sung, sed ĉiam trovis, ke la fenestro estis firme fermita. Mi ĵetis al ĝi ŝtonetojn, kriegis, sed ricevis nenian respondon.

KURANTAJ AFEROJ

POR PLI RIĈA KULTURA VIVO DE LA KAMPARANOJ

La tradicia Printempa Festo okazos je la 18-a de februaro. Por liveri sufiĉajn materialojn por kulturaj agadoj dum tiu ĉi festo, multaj literaturaj organizoj en Pekino mobiliziĝas. Ĉirkaŭ 1,200 filmoj estas reproduktataj kaj sendotaj al la kamparoj en diversaj lokoj. Pli ol 96,000,000 ekz. kaj 800 specoj da novjaraj bildoj, pordobildoj, bildokalendaroj kaj mallongaj teatraĵoj estas sendotaj al la kamparanoj, Plejparto de la filmoj estas enlande produktita, ili prezentas al la rigardantaro la socialisman konstruadon kaj sciojn pri produktado kaj higienoj. Ankaŭ la teatraĵoj grupoj en Pekino preparas cirkulantajn prezentadojn dum la festo por la kamparanoj. Ĝin partoprenos multe da famaj aktoroj.



La Praepoko de Ĉinio

A. La Ĉina Simio-homo (*Sinanthropus Pekinensis*) kaj la Montsupra Kavernulo.

Jam en tre malproksima antikveco sin trovis homoj laborantaj kaj vivantaj sur la tero de Ĉinio.

La Ĉina Simio-homo Antaŭ ĉirkaŭ kvincent mil jaroj, ĉe Zhoukoudian, sudokcidente de Pekino, vivis primitivaj homoj, kiujn ni nomas la "ĉina simio-homo". Ili aspektis ne tute simile al nuntempaj homoj. Iliaj brovosto kaj makzeloj antaŭen elstaras, kaj la frunto kliniĝas malantaŭen. Ilia krania kapacito atingis nur tri kvaronojn de tiu de la modernaj homoj (*homo sapiens*).



Tiam en Norda Ĉinio la klimato estis varmeta kaj humida, kaj kelkloke kompare seka. En densaj arbaroj, vastaj herbejoj, sur bordoj de riveroj kaj lagoj troviĝis sovaĝĉevaloj, cervoj, antilopoj, grandaj rinoceroj, elefantoj kaj bubaloj. Sur montoj kaj en kavernoj vivis ursoj kaj tigroj. En la arbaro vagis la plej kruela malamiko de la homoj — la rapirdentaj tigroj (*machairodus*).

La ĉinaj simio-homoj faris malfacilajn batalojn kontraŭ la naturo. Ili jam kreis batalilojn por konkeri ĝin, nome bastonojn, batfaritajn nepolurigitajn ŝtonajn ilojn kaj fajron, kiun ili reportis el brulanta arbaro kaj konservis en la kaverno.

La ĉina simio-homo kolektis de la vegetaĵoj radikojn, tigojn, semojn kaj fruktojn kaj ĉasis bestojn per bastonoj kaj krudaj ŝtonaj iloj por havigi al si manĝaĵojn. Cervo estis ilia ĉefa ĉasobjekto. Ne povante akiri sufiĉe da nutraĵo per la tro simplaj kaj krudaj iloj, ili estis konstante minacataj de malsato.

La ĉina simio-homo ankoraŭ ne scipovis konstrui domojn, ili loĝis amase en kavernoj, kiuj ŝirmis la konservatan fajron. Ili fortimigis bestojn kaj rostis manĝaĵojn per la fajro. Montkavernoj ĉe rivero estis la plej taŭgaj lokoj por ilia vivado. La rivero liveris al ili akvon por trinkado, sur la bordo ili povis trovi ŝtonojn taŭgajn por fari ilojn


kaj kapti bestojn, kiuj venis trinki akvon el la rivero.

La Montsupra Kavernulo

La homoj vivantaj ĉe Zhoukoudian antaŭ ĉirkaŭ kvindek mil jaroj estas nomataj montsupraj kavernuloj. Jam ne estas granda diferenco inter ili kaj la modernaj homoj.

Krom ŝtonaj iloj, ili povis fari ankaŭ ostajn ilojn. Ili faris el bestaj ostoj kudrilojn, per kiuj ili kudris vestojn el feloj. Krom kolektado de radikoj, tigoj, semoj, fruktoj de vegetaĵoj kaj ĉasado de bestoj, la montsupraj kavernuloj ankaŭ povis kapti fiŝojn kaj ostrojn, kiuj taŭgas por manĝo nur post kuirado. Kiam la montsupraj kavernuloj povosciiis artefari fajron kaj komencis manĝon de fiŝoj, ilia sfero de aktiveco ege vastiĝis.

La ĉina simio-homo kaj la montsupra kavernulo uzis batfaritajn ŝtonaĵojn. Ĉi tiun epokon oni nomas la paleolitiko.



Montsupra kavernulo kaj liaj laboriloj

B. Kulturoj de Kolora Fajenco kaj Nigra Fajenco

Neolitiko Antaŭ ĉirkaŭ kvin aŭ ses mil jaroj, niaj prauloj jam plibonigis la ilojn. Ili faris el elektitaj ŝtonoj hakilon, glavon, martelon, ĉizilon kaj ilin poluris. El ostoj, kornoj kaj konkoj ili faris kudrilon, borilon, falĉilon kaj segilon. Multaj iloj havis boritajn truojn, tiel ke oni povu alfiksi al ili tenilojn aŭ trairigi ŝnuron.

Oni nomas la epokon de poluritaj ŝtonaj iloj la neolitiko.

Pafarko, Sago kaj Fajenco

Pafarko kaj sago estis la plej gravaj iloj en la epoko neolitiko. Ili estis jam inventitaj antaŭ ĉi tiu epoko. Per pafarko kaj sago, ili povis pafi malproksimajn birdojn kaj bestojn, kaj tiel pli faciliĝis la akiro de manĝaĵoj.

Fajenco estas grava elpensajo de la epoko neolitiko. La fajenco farita de homoj sur la loesa

altebeno estis ruĝa kun nigraj aŭ purpuraj desegnoj. Oni nomas ĉi tiun belaspektan fajencon kolora fajenco. La fajenco farita de la homoj sur la granda ebena de Norda Ĉinio estis nigra, delikata, maldika kaj tre glata. Oni nomas ĝin nigra fajenco.


Fajenco, kiun oni povas uzi por enteni akvon, objektojn kaj kuiri, estis vazo tre utila.

Brutobredado, Agrikulturo kaj Vivo de Fiksloĝado

Se post manĝado ankoraŭ restis iuj el la ĉasakiritaj vivantaj bestoj, niaj prauloj ilin tenis por buĉi en tempo de bezono. Ili akiris iom post iom spertojn en bredado de porko, hundo, bovo kaj ŝafo. Tiel komenciĝis la brutobredado.

Semoj de vegetaĵoj falis teren kaj kelkfoje elkreskis vegetaĵoj. Niaj prauloj plurfoje tian fenomenon rimarkis, kaj ellernis iom post iom la semadon de grenoj. Tiel komenciĝis la agrikulturo.

Tiam la homoj sur la loesa altebeno kaj sur la granda ebena de Norda Ĉinio loĝis en vilaĝoj ĉe rivero. Ili konstruis domojn el tero, kaj faris por ili tegmentojn el cinodo. La domoj estis unuformaj kaj preskaŭ samgrandaj. Ili plugis teron per ŝtona tranĉilo, kulturis diversajn grenojn kaj bredis porkojn, hundojn, bovojn kaj ŝafojn. Ili faris fadenojn el fibroj de kanabo, teksis tolon kaj faris vestojn el ĝi.



Maldekstre: Nigra fajenca kuirilo.

Dekstre: La primitivuloj faras fadenon kaj veston.

C. Legendo pri Huangdi, Yao, Shun kaj Yu

Genta Komunumo

En la epoko neolitiko de Ĉinio, la homoj farantaj kolordesegnan fajencon kaj nigran fajencon vivis en genta komunumo, kiu jam ekzistis antaŭe.

En la genta komunumo, ĉiuj membroj estis parencoj; tero, brutaro kaj laboriloj apartenis al la tuta komunumo, nur bataliloj estis uzataj kaj konservataj de la individuoj. Ili kune malfacile laboris, ĉasis, fiŝis, paŝtis, terkulturis kaj konstruis domojn. La fruktoj de ilia laborado estis ĝuataj de ĉiuj kune. La manĝaĵo, kiun ili akiris, ne estis multa, tial se iu manĝus tro multe, aliaj devus su-

feri malsaton. La gentestro, kiu gvidis la komunumon, estis elektita de la gentanoj, kaj la gravaj aferoj estis diskutataj en kunveno. Tiam ekzistis nek klasoj nek privataj proprajoj kaj neniu povis ekspluati alian.

Kelkaj najbaraj gentoj organiziĝis en tribo gvidata de tribestro. Por batalakiri pli bonan paŝtejon aŭ ĉasejon, kelkaj triboj organiziĝis en trib-alianco kontraŭ malamikaj triboj. La ĉefo de trib-alianco estis trib-alianca estro.

Huangdi, Yao, Shun kaj Yu

Laŭ la legendo, antaŭ ĉirkaŭ pli ol kvar mil jaroj, en Ĉinio vivis estro de trib-alianco Huangdi, kiu estis eminenta ĉefo en la baseno de la Flava Rivero. Tiam multaj gravaj inventoj jam estis faritaj, ekzemple farado de veturiloj kaj ŝipoj, bredo de silkraŭpoj, silkteksado, kreo de skriba lingvo k. c. Tiuj ĉi inventoj efektiviĝis dank' al la longdaŭra batalado en produktado de la laboruloj. Ne longe post Huangdi, estiĝis unu post alia tri famaj estroj de trib-alianco: Yao, Shun kaj Yu. La trib-alianca estro nomiĝis "Di". "Di" havis sian helpanton. Laŭtradicie, post la morto de "Di", Di-iĝis anstataŭe la helpanto.

Dum la regado de Yao, en la baseno de la Flava Rivero okazis diluvo. Yao kunvokis kunvenon de la trib-alianco por diskuti pri forkonduko de la inundakvo. Iu tribestro proponis, ke Gun gvidu la laboron. Tiun proponon Yao ne tute konsentis, sed ĉar ĉiuj aliaj tribestroj volis, ke Gun provu, tial la propono estis akceptita. En alia kunveno, oni diskutis pri nomado de helpanto. Iu proponis Shun, kaj ĉiuj aprobis. Gun ne sukcesis en forkonduko de la akvego, Yao kaj Shun lin ekzekutis kaj ordonis, ke lia filo Yu daŭrigu laboron. Yu klopodis kune kun la popolanoj. Post 13 jaroj, ili sukcesis konduki la akvegion en la riverojn kaj maron, kaj nur tiam la homoj ekpovis reiri sur la ebenon kaj vivi en paco.

Post kiam Yao mortis, Shun fariĝis Di kaj oni elektis Yu kiel lian helpanton. Post la morto de Shun, Yu fariĝis Di.

Xia-dinastio

Tiutempe la laborfruktoj de la homoj plimultiĝis. En la genta komunumo aperis grandaj familioj, kiuj estis multmembraj kaj fortaj. Ili uzurpis komunan teron kaj brutojn de la komunumo kaj ne permesis al aliaj ilin uzi. Tiel en la genta komunumo estiĝis mal-egaleco, iuj riĉiĝis kaj aliaj malriĉiĝis. La familio de Yu estis riĉa kaj granda familio.

Post la morto de Yu, lia filo Qi uzurpis la tronon kaj Yi, la helpanto de Yu, ne heredis la regpovon laŭ la tradicio. Depost tiu tempo, la idoj de Qi sinsekve tronis de generacio al generacio, kaj tiel fariĝis Xia-dinastio en la historio.

Esperantigis Zensto

LAŬDIRE, kiam la ĉielo kaj la tero ankoraŭ ne apartiĝis, la universo estis ĥaosa kaj malluma maso kiel ovegto. Nia praavo Pangu ja ĝermis en tiu ovegto.

Pasis 18,000 jaroj. Pangu subite vekigis. Malfermite la okulojn, ho! nenion li povis vidi, krom malluma, glueca maso. Li sentis sufokon.

Tion li ne povis toleri kaj kolerigite li alprenis, oni ne scias de kie, iun hakilon kaj ĝin eksvingis, aŭdigis terura bruo, kaj la ovegto krevis. La malpezaj kaj klaraj elementoj de la ovo iom post iom supreniĝis kaj fariĝis la ĉielo. Tiuj pezaj kaj malklaraj elementoj ekmal-supreniĝis, kaj estiĝis la tero.

Ekde tiam apartiĝis la ĉielo kaj la tero. Timante ke ili reunuiĝos Pangu do staris inter ili portante la ĉielon sur la kapo kaj subpremante la teron per la piedoj, ŝanĝigante dum la ĉielo kaj la tero ŝanĝiĝis.

Kiel Kreiĝis

la Ĉielo kaj la Tero

Ĉiutage la ĉielo altiĝis je 10 futoj kaj same dikiĝis la tero, do la korpo de Pangu ankaŭ ĉiutage altiĝis je 10 futoj. Tiel pasis ankoraŭ 18,000 jaroj. La ĉielo fariĝis tre alta kaj la tero, tre dika. La korpo de Pangu fariĝis ankaŭ tre giganta. Laŭdire la longeco de lia korpo estis 90,000 li-oj*. Do li staris inter la ĉielo kaj la tero kiel kolosa kolono, malhelpante ilin reunuiĝi en mal-lumon kaj ĥaoson.

Oni ne sciis kiom da jaroj Pangu tiel staris plenumante sian malfacilan taskon. Fine la ĉielo kaj la tero ŝajne jam sufiĉe firmiĝis kaj li ne bezonis timi ke ili reunuiĝos. Li sentis grandan laciĝon kaj bezonis iom ripozi. Li kuŝiĝis sur la tero kaj endormiĝis por eterne.

Granda ŝanĝo okazis je lia morto. Liaj spiroj fariĝis

ventoj kaj nuboj, liaj voĉoj fariĝis tondroj, la maldekstra okulo fariĝis la suno kaj la dekstra, la luno. Liaj manoj, piedoj kaj korpo fariĝis la kvar terekstretoj kaj famaj montoj en diversaj lokoj, lia sango fariĝis riveroj, liaj vejnoj fariĝis vojoj, liaj muskoloj kaj karno fariĝis kampoj, liaj haroj kaj lip-haroj fariĝis steloj en la ĉielo, liaj haŭto kaj haretoj fariĝis floroj, herboj kaj arboj. Liaj dentoj, ostoj kaj medolo fariĝis brilaj metaloj, malmolaj ŝtonoj, rondaj perloj kaj delikataj jadoj; eĉ la plej senutila ŝvito sur lia korpo fariĝis roso kaj pluvo. Unuvorte, Pangu faris, per sia tuta korpo, novkreitan mondon riĉa kaj bela.

Esperantigis Hofan

*unu li-o = 1/2 kilometro.

KURANTAJ AFEROJ

SCIENCO AL LA KAMPARO

Pligrandskala propagando de popularaj sciencoj komenciĝos en Ŝanxi-provinco en 1958. Krom 46 filioj de la Asocio por Disvastigo de Sciencaj kaj Teknikaj Scioj en 46 gubernioj fondiĝos ĉijare pliaj filioj en 30 gubernioj, kaj propagandaj grupoj organiziĝos en aliaj 25 gubernioj. Entute 880 grupoj kun 5,000 membroj fondiĝos en la tuta provinco. Per sciencaj lekcionoj, ekspozicioj pri sciencaj kaj teknikaj scioj, projekcio de sciencaj filmoj kaj magilanternaj bildoj, ĝi donos

sciencajn kaj teknikajn sciojn al 10,000,000 popolanoj. Krom plibonigo de la 600 ekzistantaj vesperaj teknikaj lernejoj oni ankaŭ fondos novajn. Ankaŭ en la lecionoj de vesperaj lernejoj por analfabetoj oni aldonos sciencajn kaj teknikajn sciojn.

ANTIKA ŜEFURBO ELFOSITA

Xi'an en Ŝanxi-provinco estis ŝefurbo de pluraj dinastioj en ĉina historio. Lastjare la Arkeologia Instituto de la Scienca Akademio de Ĉinio retrovis antikvajn urbojn de la dinastioj Zhou (1200—403 a.K.), Han (206 a.K.—220 p.K.) kaj Tang (618—

907 p.K.). La ŝefurbon de Han-dinastio oni trovis proksimume 5 kilometrojn nordokcidente de Xi'an. Kvar el ĝiaj urbopordoj jam estas elfositaj. Ankaŭ la muro de la imperiestra palaco estas trovita. Ĉirkaŭ duonkilometron norde de Xi'an oni trovis someran palacon de la unua imperiestro de Tang-dinastio. Multaj sigelargilo de la altrangulo troviĝas en ĝi. Ĉe Chang'an-gubernio oni elfosis la unuan ŝefurbon de Zhou-dinastio. En tomboj oni trovis multajn tervazojn bronzaajn objektojn kaj jadaĵojn. Materialojn pri la formo de antikvaj ĉaroj oni akiris en la tombo por ĉaroj kaj ĉevaloj.

Plano por Han-lingva Fonetika Alfabeto

(Aprobata de la 5-a Sesio de la Unua Tutlanda Popola Kongreso) Ekde ĉi tiu numero ni uzas la Han-lingvan Alfabeton por la ĉinaj propraj nomoj neesperantigitaj.

—La red.

I. Alfabeto

Lit.*	Nomoj per IFS**	Lit.	Nomoj per IFS
Aa	a	Nn	ne
Bb	pe	Oo	o
Cc	ts'e	Pp	p'e
Dd	te	Qq	t'ĝiu
Ee	ə	Rr	ar
Ff	ef	Ss	es
Gg	ke	Tt	t'e
Hh	xa	Uu	u
Ii	i	Vv	ve
Jj	t'ĝie	Ww	wa
Kk	k'e	Xx	ĝi
Ll	el	Yy	ja
Mm	em	Zz	tse

v estas uzata nur por fremaj vortoj, minoritataj lingvoj kaj dialektoj. La skriba formo estas laŭ la ĝenerala kutimo de latina alfabeto.

II. Konsonantoj

Lit.	IFS	Lit.	IFS
b	p	j	t'ĝ
p	p'	q	t'ĝ'
m	m	x	ĝ
f	f	zh	t'ŝ
d	t	ch	t'ŝ'
t	t'	sh	ŝ
n	n	r	ĝ
l	l	k	ts
g	k	c	ts'
k	k'	s	s
h	x		

zh ch sh povas esti simpligitaj en Z ĉ ŝ, kiam uzataj kiel fonetikaj simboloj por Han-ideografoj.

III. Vokaloj

Lit.	IFS	Lit.	IFS
a	a	i	i
o	o	u	u
e	ə	ü	y
ê	e		

IV. Diftongoj kaj Nazaj Vokaloj

Lit.	IFS	Lit.	IFS
ia	ia	uan	uan

ua	ua	üan	yan
uo	uo	en	ən
ie	ie	in	in
üe	ye	uen	uən
ai	ai	ün	yn
uai	uai	ang	aŋ
ei	ei	iang	iaŋ
uei	uei	uang	uaŋ
ao	ao	eng	əŋ
iao	iao	ing	iŋ
ou	ou	ueng	uəŋ
iou	iou	ong	oŋ
an	an	iong	ioŋ
ian	ian		

1) Post zh ch sh r, i=l; post z c s, i=1.

2) Vokalo kun konsonanto er ar, uzata je la fino de silabo skribiĝas kiel r, ekz. la ĉina vorto por 'infano' estas 'ertong' (兒童) sed tiu por 'floro' estas 'huar' (花兒).

3) ê uzata post i ü aŭ antaŭ i, skribiĝas sen supersigno.

4) Vokalo i kaj diftongoj kaj nazaj vokaloj komencitaj per i uzataj sen antaŭiranta konsonanto skribiĝas kiel yi ya ye yao you yan yin yang ying yong.

Vokalo u kaj diftongoj kaj nazaj vokaloj komencitaj per u uzataj sen antaŭirantaj konsonantoj skribiĝas kiel wu wa wo wai wei wan wen wang weng.

Vokalo ü kaj diftongo kaj nazaj vokaloj komencitaj per ü skribiĝas kiel yu yue yuan yun, sen supersigno.

Vokalo ü uzata post j q x skribiĝas kiel ju qu xu, sen supersigno; sed post l n kiel lü nü, kun supersigno.

5) iou, uei, uen kun antaŭmetita

konsonanto skribiĝas kiel iu ui un ekz. niu qui lun.

6) ng povas esti simpligita en ŋ, kiam uzata kiel fonetika simbolo por Han-ideografoj.

V. Signoj por Tonoj

Unua tono	Dua tono	Tria tono	Kvara tono
—	/	∨	\

Neŭtrala tono sen signo

La tona signo estas metita sur la ĉefa vokalo de silabo. Ekz. m^ā (媽 panjo) m^á (麻, kanabo) m^ǎ (馬 ĉevalo) m^a (罵 riproĉi, insulto) ma (嗎 ĉu?).

VI. Divida Signo

Silaboj komencitaj per a o e, kiam uzataj post alia silabo kaj kaŭzantaj miskomprenon, estas signitaj per la divida signo ('), ekz. 'pi'ao' (du silaboj 皮襖 pelta jaketo), sed piao (unu silabo 漂, flosi).

*Lit.=litroj

**IFS=internaciaj fonetikaj simboloj.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj

Traduko aŭ aliaj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur:

1) Post la utiligo rimarku el kiu numero de nia gazeto ĝi devenis.

2) Sendu al ni 4 ekzemplerojn de la materialoj sur kiu aperis la tradukoj aŭ alimaniere utiligoj.

3) Sciigu al ni kia estas la eldonado sur kiu aperis via traduko aŭ aliaj utiligoj, se eble ankaŭ nombron de la legantoj.

Per tiaj kunlaboroj, vi multe helpas la pluan prosperon de nia movado en Ĉinio, sekve ankaŭ alportos plian brikon por la sukceso de Esperanto-movado en la tuta mondo.

NOVA ETAPO

de la Ĉina Esp-Movado

1957, la 70-jara datreveno de la publikiĝo de Esperanto, markis novan etapon de ĉina Esperanto-movado. Post la revigliĝo de Ĉina Esperanto-Ligo, organiziĝis en diversaj urboj Esperantaj kursoj kaj lernogrupoj. La lernantoj en tiuj kursoj kaj grupoj jam en sia lernado komencis korespondadon kun esperantistoj en aliaj landoj. Unu el la lernantoj diris: "Laŭ vortoj de Lenin, scio de unu plia fremda lingvo egalas al unu plia fenestro por la domo. Sed lerninte Esperanton, mi sentas kvazaŭ malfermiĝus fenestroj en ĉiuj flankoj de la domo." Je la 40-a datreveno de la Oktobra Revolucio amaso da salutleteroj estis senditaj de ĉinaj esperantistoj tra la tuta lando al Sovetiaj esperantistoj. En Enshi, urbeto de Hubei-provinco, K-do Jaŭ Pin starigis eĉ regulan rilaton kun K-do A. Erjuhin, redaktoro de "Severnaja Pravda" (Norda Vero) kaj "Lesnik Severa" (Norda Arbarkulturisto) en Arĥangelsk de Sovetio. Li peris ankaŭ la korespondadon inter K-do A. Erjuhin kaj agrikulturaj kooperativoj en Enshi.

Instruadoj de Esperanto en lernejoj ne prosperis en Ĉinio. Antaŭe nur en 1921 ĝi estis instruata en tiama Pekina Universitato, sed post nelonge tiu kurso ĉesis, kaj Esperanto neniam plu sukcesis oficiale enpenetri iun altan lernejon. Sed ekde la dua semestro de 1957 Ĉina Popola Universitato, la novtipa ŝtata universitato fondita post la liberiĝo de Ĉinio, enkondukis Esperanton kiel nedevigan kurson en la ĵurnalisa fakultato.

Lasttempe okaze de la 98-a datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, en Pekina Laborista Kultura Palaco malfermiĝis nova kurso por laboristoj kaj sindikataj laborantoj. Tio kreis novan esperon por ĉina Esperanto-movado, ke Esperanto-movado en Ĉinio disvastiĝos ne nur en la kadro de intelektuloj, sed enradikiĝos kaj disfloros ankaŭ en la laboristaro.

Pli ol 25 esperantistajn gastojn el 11 landoj akceptis Ĉina Esperanto-Ligo ekde decembro 1956 ĝis decembro 1957. Inter ili troviĝis Sovetiaj specialistoj kaj teknikistoj helpantaj socialisman konstruadon de Ĉinio, amikaj

delegitoj de popolaj organizoj el Japanio kaj Francio, la speciala ambasadoro de UEA por Oriento, la "Vaganta Avino" turistino el Novzelando kaj la preterpasantoj tra Pekino por partopreni la festivalon en Moskvo aŭ por vojaĝi al aliaj landoj. En la kunvenoj de Pekina Esperanto-Klubo okazantaj en ĉiu dua dimanĉo oni ofte havis la feliĉon aŭdi raportojn aŭ paroladojn de eksterlandaj esperantistoj.

La festo de la 98-a datreveno de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof en 1957 vekis je la publiko en Ĉinio pli grandan atenton pri E-movado. En tiu tago ne nur la Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis memorkunvenon en la Pekina Laborista Kultura Palaco, kie malfermiĝis samtempe Esperanto-kurso por laboristoj, sed ankaŭ sur la du plej grandaj ĵurnaloj en Ĉinio aperis samtempe artikoloj pri Esperanto kaj D-ro Zamenhof.

Parolado de Sovetia kamarado Prof. N. S. Kokŝarskij en tiu ĉi kunveno vekis grandan intereson de la ĉeestantoj. Li parolis pri la amikeco inter ĉina kaj Sovetia popoloj kaj la rolo de Esperanto en interligiĝo de la popoloj en la mondo.


Tiun ĉi feston de Zamenhof raportis ankaŭ Xinhua Novaj-agentejo, la ŝtata inform-serva institucio pri novaĵoj. Tial en la sekvanta tago ĉiuj pli-malpli grandaj ĵurnaloj aperigis informon pri la festo.

Nun lernolibro de Esperanto taŭga por ĉinoj kaj nova vortareto estas kompilataj. Sub la subtenado de tutmondaj esperantistoj E-movado certe prosperos en Ĉinio kaj ĝi ludos pli gravan rolon por akceli la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

HONFAN

Pekinaj geesp-istoj celebras Zamenhof-feston






LA MAJSTRA PENIKO DE
QI BAI-SHI ELPENTRIS
LIAN PROFUNDAN AMON
AL LA NATURO, VIVO,
PACO KAJ LA PATRIO

1. Ĉefministro kampuligas,
Mon' en poŝo ne troviĝas.
Li preferas rabistiĝi
Ol pro mono senhontiĝi.

(Pentraĵo kun satiro
verkita en Pekino, 1943,
sub la regado de la
japanaj invadistoj kaj la
naciperfiduloj.)

2. Packolomboj
3. Floroj kaj Insektoj
4. Salikokoj





OTIEKA UNIVERZITETNA
KUL
BIBLIOTEKA